

EL POPOLA ĈINIO

5
1977

中國新道



Amasa arta aktivado de



nacimalplimultoj

Hingiang-aj artistoj prezentas sur strato de Urumĉi.





La Ligiang-a Arta
Propaganda Taĉ-
mento de Junnan
en kamparo

Amatoraj artistoj de la korea nacieco prezentas ĉe kamprando.





Artistoj de la Ulanmuĉi-a Trupo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio diligente studas la verkon de Prezidanto Maŭ "Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an"

Artistinoj ludas dancon "Melkado" por paŝtistoj en foiro "Nadam"








Membroj de la arta trupo de la Hajhi-a Mongola, Tibetana kaj Kazaĥa Aŭtonoma Subprovinco de Kinghaj iras por prezentado.

Iu gubernia arta propaganda trupo de la Li- kaj Miaŭ-nacieca Aŭtonoma Subprovinco de Hajnan-insulo de Guangdong-provinco prezentas en li-a montvilaĝo.



Iu gubernia amatora arta propaganda taĉmento de la Gannan-a Tibetana Aŭtonoma Subprovinco de Gansu prezentas por paŝtistoj.





Dung-aj kantistinoj de Guanghi elkore kantas la Komunistan Partion de Ĉinio kaj socialismon.

Membroj de la arta trupo lernas dancon de la maljuna miaŭ-a popola artisto.



Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Enhavo

KOVRILO:

Dancistinoj de la Janbian-a Korenacieca Aŭtonoma Subprovinco de Gillin en ekzercado

DORSKOVRILO:

Termofonta akvofalo

Ree printempo de literaturo kaj arto	2
Feliĉa rememoro	3
Plenvoĉe kanti por la popolo	7
Ĝojo de maljuna pentristo	9
De kie venas la efekta forto de arto	11
Lerni de revoluciulo en ludado de ties rolo	12
“Rododendro” ĉe la piedo de Ĉangbaj-montaro	14
Virinoj en la blua ĉielo	18
Prezidanto Maŭ estas granda savanto de la ĉina popolo	21
Alte flirtas la flago de popola komunumo	23
Vizito al petrol-havenoj	27
POR AMIKECO: Rememore al hinda amiko D-ro Kotnis	32
TRA ĈINIO: Cangŝan-monto kaj Erhaj-lago	36
HISTORIAJ OBJEKTOJ: Lana litkovrilo	38
KURANTAJ AFEROJ	39



Ree Printempo de Literaturo kaj Arto

de **Jurnalistoj de EPC**

En majo de 1942, ĉe Jangjialing de Jan-an, la sidejo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, okazis kunsido de literaturaj kaj artaj laborantoj. En pli ol 20 tagoj Prezidanto Maŭ trifoje ĉeestis la kunsidon kaj faris du gravajn paroladojn kiuj estis publikigitaj poste kun titolo "Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an". Ĝi estas literaturo kun granda historia signifo, solvis la problemon de fundamenta direkto servigi literaturon kaj arton al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj difinis la ĝustan linion por disvolvi la proletajn revoluciajn literaturon kaj arton de Ĉinio.

En ĝoja celebrado de la venko de la ĉina popolo en frakaso de la "kvarpersona bando" de Vang, Gang, Giang kaj Jaŭ, alvenis la 35-a datreveno de la publikigo de la "Paroladoj" kaj ni pli forte sopiras la grandan gvidanton kaj instruiston Prezidanton Maŭ. Lastatempe ni vizitis plurajn literaturajn kaj artajn laborantojn, inter kiuj estas poeto He Kifang, kiu siatempe aŭskultis la paroladojn de Prezidanto Maŭ en la literatura kaj arta kunsido, kantistino Vang Kun, kiu estis siatempe en Jan-an, filmaktoro Gang Lianven, kiu plenkreskiĝis en la Granda Proleta Kultura Revolucio, maljuna pentristo Guan Ŝanjue kaj veterana aktorino de pekina opero Gaŭ Janhia. De diversaj flankoj ili rakontis al ni siajn proprajn spertojn pri arta praktiko farita de ili laŭ la direkto montrita de la "Paroladoj" kaj varme aklamis la prosperecon de la ĉinaj literaturaj kaj artaj rondoj post frakaso de la "kvarpersona bando".

Feliĉa rememoro

EN la lastaj tagoj, poeto He Kifang dronis en kortuŝa feliĉo, skribante memoraĵojn pri la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an. Li diris al ni, ke ŝajnas al li ke li estas ankoraŭ 30-jara junulo ĵus finaŭskultinta la paroladojn de Prezidanto Maŭ, kaj la sonoraj kaj signifoplenaj paroloj de Prezidanto Maŭ, kiuj multe levis lian konon kaj konscion, ankoraŭ sonas ĉe liaj oreloj.

La poeto estas jam pli ol 60-jara, tamen ankoraŭ vigeleplena kaj fervorega. Dum la intervjuo de 5-6 horoj li multe parolis kun ĝojo, kaj ni malofte lin interrompis. Ĉisube estas la ĉefa enhavo de lia parolado.

“... Mi komencis verki poemon en 1927 kaj ankaŭ verkis eseojn poste, tamen miaj ver-




He Kifang

kajoj estis tro malmultaj en la 15 jaroj de 1927 ĝis 1942. Tiam mi estis kvazaŭ mallarĝa rivereto kun malmulta akvo, kiu povis facile sekiĝi, kaj pro tio mi tre ĉagreniĝis. Nur post aŭskultado de la paroladoj de Prezidanto Maŭ ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an mi komprenis, ke literaturo kaj arto fontas el la vivo de la popolo, tamen mi tre malmulte kontaktis kun la popolamasoj kaj tre malmulte konis iliajn vivon, batalon, penson, sentimenton kaj lingvon. Kiel malgranda estas tia poeto, kiu kantas nur la vivon de li mem kaj de lia ĉirkaŭa malgranda rondo!

“En 1938 mi iris al Jan-an, kie mi partoprenis en la revolucio kaj aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. Nelonge post tio mi iris al la kamparo en antaŭurbo de Jan-an kune kun kadroj kaj kunlernantoj de la literatura fakultato de la Arta kaj Literatura Kolegio Lusin por helpi kamparanojn tie en aŭtuna rikoltado. Poste mi kune kun parto de ili iris al la fronto kaj postfronta kontraŭ-japana demokratia bazloko. Mi vizitis nordokcidentan Ŝanhi, la Ŝanhi-Ĉahar-Hebej-an limregionon kaj centran Hebej. Kune kun soldatoj kaj kadroj de la Okavoja Armeo mi marŝis, transpasis fervojan blokadan linion de la malamiko, militiris al la Ebenajo de Centra Hebej kaj renkontis “forbalaon” de japanaj faŝistaj trupoj. Ni devis marŝadi nokte kaj ĉirkaŭire kaŝludi kun la malamikoj. Dum nia marŝado malamikaj aeroplanoj flugis super nia kapo, kaj iliaj maŝinpafiloj kaj kanonoj bruadis ofte ambaŭflanke de nia trupo. Poste mi revenis al Jan-an, kaj iom plifortiĝis mia verkemo. De 1940 ĝis printempo de 1942 min ofte atakis, skuis kaj ĝenis neskribitaj poemoj. Mi ofte kovis poemojn en nokto kaj matene jam povis facile skribi kelkdek, eĉ cent versojn en unu spiro. Tiuj lirikaj poemoj estis poste kolektitaj en *Kantoj en Nokto kaj Tago*. Etburĝaj intelektaj legantoj, kiuj havis vivsperton similan al la mia, ŝatis miajn poemojn. Foje iu studentdevena kamarado, kiu ripozis en kadra sanatorio, skribis al mi leteron elmetante pensigan problemon. Li skribis, ke en la sanatorio okazis disputo inter li kaj kelkaj kamaradoj devenintaj de laboristoj

kaj kamparanoj: li aprobas miajn poemojn, dum ili ne ŝatas ilin. Post aŭskultado de la paroladoj de Prezidanto Maŭ ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an mi komprenis, ke kvankam mi partoprenis en la revolucio kaj aliĝis al la Partio, tamen mia mondkoncepto estis ankoraŭ nereformita kaj mia burĝa kaj etburĝa sentimonto neŝanĝita. Kvankam miaj poemoj kaj eseoj prikantas Jan-an, la revolucion, la Komunistan Partion de Ĉinio kaj la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn, tamen miaj verkoj kun intensa burĝa kaj etburĝa sentimonto ne povis reprezenti laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn, nek vere speguli ilian vivon kaj batalon, ili estis nur ‘memprezento’ de revoluciaj etburĝoj, kaj ĝuste pro tio kadroj devenintaj de laboristoj kaj kamparanoj ne ŝatis ilin.

“De 1940 ĝis printempo de 1942 malmultaj homoj de la literaturaj kaj artaj rondoj de Jan-an, kiuj havis seriozan eraron en politiko kaj ideologio, malkontentis pri Jan-an, la Partio, la revolucia bazloko kaj revoluciaj novaj aferoj kaj levis reakcian fluon de ‘malkaŝado de la mallumo’. Ili opiniis, ke Jan-an, la Partio, la revolucia bazloko kaj novaj aferoj en la revoluciaj laboroj ankoraŭ havas multan ‘mallumon’. Ili mem verkis kaj instigis aliajn verki eseojn kaj romanojn por ataki la ‘mallumon’. La publikigo de iuj el iliaj reprezentaj verkoj en Jan-an-aj revuoj regataj de ili ricevis varman aklamon kaj bonvenigon de spiona institucio de Ĉiang Kajŝek, kaj ili estis grandkvante represitaj kaj disdonitaj en la regionoj regataj de Kuomintango. Kvankam mi kaj aliaj partianaj kamaradoj de la literaturaj kaj artaj rondoj estis nereformitaj en ideologio, tamen ni oponis kontraŭ tiu fluo el politika konscio kaj entuziasmo de revoluciaj etburĝaj intelektuloj, kiuj aliĝis al la Partio, kaj elmetis proponon de ‘prikantado de la lumo’ por kontraŭstari al ili. Tiam mi opiniis nin pravaj. Tamen la fluo de ‘malkaŝado de la mallumo’ daŭre inundis pro tio, ke, unue, ni kun malalta teoria nivelo de Marksismo kaj Leninismo ne povis venki tiujn kiuj pledis por ‘malkaŝado de la mallumo’ en teorio dum la disputado kun ili kaj, due, ankaŭ niaj verkoj ‘prikantantaj la lu-



Jan-an

mon' ne povis venki tiujn de 'malkaŝado de la mallumo'.

"Nur post aŭskultado de la paroladoj de Prezidanto Maŭ ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an, mi klare komprenis en teorio, kial la teorio pri 'malkaŝado de la mallumo' estas erara kaj reakcia. En siaj paroladoj Prezidanto Maŭ uzis sufiĉe longan parton por refuti diversajn absurdajn teoriojn de 'malkaŝado de la mallumo'. Tiam mi komprenis, ke ankaŭ ni pledantaj por 'prikantado de la lumo' ne estas ĝustaj. Pri la disputoj en Jan-an Prezidanto Maŭ faris jenan konkludon en siaj paroladoj:

La problemo 'por kiuj' estas problemo fundamenta, problemo principa. En la pasin-

teco, la disputo, diverĝoj, kontraŭstaroj kaj malunuiĝo inter iuj kamaradoj estiĝis ne en tiu ĉi fundamenta kaj principa problemo, sed en problemoj kompare duagradaj aŭ eĉ senprincipaj. En tiu ĉi principa problemo, tamen, la disputantoj montris apenaŭ ian diverĝon kaj havis preskaŭ en plena konkordo iagradan tendencon malestimi la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn kaj sin izoli de la amasoj.

La disputoj de la literaturaj kaj artaj rondoj en Jan-an, kompreneble, inkluzivis tiun inter 'prikantado de la lumo' kaj 'malkaŝado de la mallumo'. La konkludo de Prezidanto Maŭ plene konvinkis min. Li opiniis, ke la disputoj pri 'problemoj kompare duagradaj' havas certan sig-

nifon, tamen li kritikis la disputantojn, kiuj en fundamenta principa problemo **'havis iagradan tendencon malestimi la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn kaj sin izoli de la amasoj'**.

“La enhavo de la paroladoj de Prezidanto Maŭ ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an estas tre riĉa kaj havas grandan signifon. Supre estas nur kelkaj ekzemploj el miaj tiamaj spertajoj. Ĝenerale dirite, la brilaj paroladoj estas rekonataj de la ĉinaj literaturistoj, artistoj, kadroj kaj popolanoj kiel klasika verko, kiu havas epokfaran profundan historian signifon kaj kreive disvolvis marksismajn kaj leninismajn teoriojn.

“En la pasintaj socioj, la literaturo kaj arto de la pasintaj klasoj kaj iliaj literaturistoj kaj artistoj ĉiam prezentis la vivon de siaj propraj klasoj kaj de klasoj kaj tavoloj facile kontaktantaj kun ili. En ilia kapo estis ĉefe la reganta ideologio de iliaj propraj klasoj, kaj ankaŭ iliaj legantoj kaj rigardantoj estis ĉefe membroj de iliaj klasoj. La plej granda malfacilo kaj demando antaŭ la revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj devenintaj de ekspluataj kaj etburĝaj familioj en la moderna Ĉinio dum periodo de la nov-demokratia revolucio estis: ili nepre devas adiaŭi por ĉiam la klasojn de kiuj ili devenis, adiaŭi la sentimenton de iliaj propraj klasoj, adiaŭi la de ili konatajn vivon kaj homojn, adiaŭi siajn antaŭajn legantojn kaj rigardantojn kaj adiaŭi la de ili konatajn literaturajn kaj artajn lingvon kaj formojn, kaj ĉefe kaj grandkvante priskribi laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn kaj ilian batalon, kun rigoraj proletaj starpunkto, vidpunkto kaj metodo, por ke literaturo kaj arto vere fariĝu unu el la konsistigaj partoj de la tuta revolucia afero, influu la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn kaj ludu rolon en unuigo de kaj eduko al la popolo.

“Tia granda ŝanĝo kaj tasko, kiel oni pensas, povas esti plenumita nur de natura disvolviĝo de la historio. Sed rigore sekvante leĝojn de literaturo kaj arto kaj samtempe kiel eble plej bone disvolvante subjektivan aktivecon, la granda kaj kreiva marksisto Kamarado Maŭ Zedong ebligis tian historian ŝanĝon efektivegeblan en 100-200 jaroj aŭ pli longa tempo, nur en kelkdek jaroj.

“La vojo por efektivigi tian grandan ŝanĝon kaj taskon estas: alvoki kaj eduki ĉiujn revoluciajn literaturajn kaj artajn laborantojn, kiuj devenis de nelaboranta popolo kaj estas profunde influitaj de burĝa ideologio, kaj la partianajn kaj nepartianajn literaturajn kaj artajn laborantojn, ke ili **'iru por longa tempo, senrezerve kaj tutkore inter la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn, en la ardajn batalojn, en la solan, plej vastan kaj plej riĉan fonton'** por akiri primitivan materialon de ĉiaj literaturo kaj arto, kombinu diligentan studon de marksismaj kaj leninismaj verkoj kun klasbatalo, praktika laboro kaj proksimiĝo al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, studu vivajn Marksisman kaj Leninisman kaj reformu sian burĝan mondkoncepton kaj burĝan kaj etburĝan sentimenton. Nur tiamaniere oni povas krei verkojn kun alta nivelo de politiko kaj arto en unueco, kiuj vere priskribas laborantan popolon kaj ilian batalan vivon kaj servas al la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

“Laŭ mia opinio, ĉefe en tio Kamarado Maŭ Zedong kreive disvolvis marksisman kaj leninisman teorion en la *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*.

“Kompreneble ‘ĉefe’ ne signifas ‘tute’. Prezidanto Maŭ disvolvis marksismajn kaj leninismajn literaturajn kaj artajn teoriojn ankaŭ en la problemo de popularigo kaj altigo, la problemo de beleco de vivo kaj arto, en unueca fronto de la literaturaj kaj artaj rondoj, en kriterio de literaturo kaj arta kritiko, en rilato inter mondkoncepto kaj krea metodo, en heredado de literaturaj kaj artaj verkoj, en kombiniĝo de revolucia realismo kaj revolucia romantikismo, en la principo **kune floru cent floroj kaj voĉojn donu cent skoloj, k. a.**”

.....

En la fino de la intervjuo la poeto modeste kaj kun fido diris al ni: “En la 35 jaroj post la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an mi okupiĝis ĉefe pri literaturo kaj arta kritiko kaj literaturo studo kaj malmulte verkis poemojn kaj eseojn. Se estos eble, mi skribos poemojn, eseojn kaj romanojn en la estonto.”

Plenvoĉe kanti por la popolo



Vang Kun kantas "Prezidanto Hua Ligiĝas kun Ni Koro ĉe Koro".

LA ĝojinda novaĵo estas cirkulata, ke la popola kantistino Vang Kun refoje sin montras sur scenejo kaj plenvoĉe kantas por la popolo post la falo de la "kvarpersona bando".

Lastatempe, ni intervjuis ŝin en ŝia hejmo. Ŝi varme akceptis nin kaj rakontis al ni sian pasintecon. Ŝi aliĝis al la revoluciaj vicoj en militaj jaroj de la Kontraŭjapana Rezistmilito, kiam ŝi havis nur 12 jarojn. Estis Maŭzedongpenso, kiu kulturis ŝin en revolucian batalanton kaj kantistinon de la popolo. Ŝi rememoris kun evidenta feliĉo pri sia alveno al Jan-an. Tie siatempe estis la sidejo de CK de KPCĈ kaj regis viclec-

plena revolucia atmosfero. Aparte post la publikigo de la verko de Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* en 1942 prospere floradis la revoluciaj literaturo kaj arto. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, la vastaj artistaj rondoj aktive iris en la amasojn por lerni de ili kaj kreis nombron da novaj verkoj riĉaj je batalspirito, ekz., Jango-operoj *Gefratoj Plugas* kaj *Legolernado de Geedzoj* estis elstaraj el tiama artkreado. Tiam ŝi diligente lernis ĉe la popolaj artistoj kaj rapide ellernis plenumi tiujn prezentojn. Ili ofte prezentis sur stratoj kaj en vilaĝoj, kaj trovis profundan ŝaton de la amasoj. Post nelonge, naskiĝis ankaŭ la grandtipa opero *Blankhara Knabino*. Ĝi profunde spegulis la ekspluatadon kaj subpremadon suferitajn de la ĉinaj kamparanoj fare de la bienula klaso en la malnova socio. La opero temas pri la malriĉkamparano Jang Bajlaŭ, kiu mortis kun neplenumita venĝo kaj lia filino Hi-er kiu devis fuĝi en profundan montaron pro persekutado fare de la bienulo kaj finfine estis savita de la Okavoja Armeo. Vang Kun estis la unua rolintino de Hi-er. Ŝi ne povas forgesi, ke en la jaro 1945 Prezidanto Maŭ rigardis la prezentadon de tiu opero kun la partoprenantoj de la 7-a Kongreso de la Partio kaj donis al la opero koran prizorgadon kaj aproban pritakson. Prezidanto Maŭ ankaŭ diris, ke en la fino de la opero devus esti mortpafita la tirana bienulo Huang Ŝijen, kaj la opera trupo tuj ĝin reviziis laŭ la instruo. Vang Kun diris al ni, ke post la prezentado, ankaŭ gekamaradoj Ĝoŭ Enlaj kaj Deng Jingĉaŭ intime ŝin akceptis kaj instigis ke ŝi devas bone lerni kaj atente aŭskulti la opiniojn de la vilaĝanoj kaj soldatoj, kaj konscii ke ŝi kantas por la popolo. Kaj samtempe ili atentigis, ke oni devas plu plibonigi kaj revizii la operon *Blankhara Knabino* laŭ la opinioj de la popolamaso.

Post tio, la trupo serioze studis la verkon de Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* por revizii kaj plibonigi la operon. Post forlaso de Jan-an, la trupo prezentis la operon en la batalfronto. Post spektado de la opero multaj soldatoj gravuris la sloganojn “Venĝu por Jang Bajlaŭ”, “Venĝu por Hi-er” sur siaj pafiloj. La soldatoj de Ĉiang Kajŝek plejparte estis filoj de malriĉuloj, perforte pelitaj de Kuomintango al milito. Kiam ili spektis la operon post kaptiĝo, ili ricevis klasedukon kaj tuj turnis siajn pafilojn kontraŭ Kuomintango kaj fariĝis fidelaj soldatoj de ĈPLA. En la uragano de Agrarreforma Movado, tiu opero servis kiel incendiilo. Kie oni ĝin prezentis, tie tuj estiĝis incendio de Agrarreforma Movado. En la kamparo, “Huang Ŝijen” servis kiel la nomo de la bienula klaso por la malriĉkamparanoj kaj dungitoj, kaj la slogano “For Huang Ŝijen” ofte resonadis en la kritikaj kaj batalaj kunvenejoj. Tiaj emociaj scenoj montris al ŝi la pozitivan efikon de la revoluciaj literaturo kaj arto **“por unuigi kaj eduki la popolon kaj por bati kaj ekstermi la malamikon”**, kaj sentigis al ŝi la devon de revoluciaj artistoj.

Post la venko de la revolucio la trupo venis al la urbo. Dum certa periodo, la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Saŭki, kiu ekskluzivis la revoluciajn literaturo kaj arton kiuj havis profundajn radikojn en la amasoj, kaj energie antaŭenpuŝis grandtipajn literaturojn kaj artojn el fremdaj landoj kaj antikvaj tempoj, konfuzante la literaturajn kaj artajn rondojn, tiel ke ili apartiĝis de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj fermis sin en ĉambro por poluri sian arton. Sub la influo de tiu ĉi linio ankaŭ Vang Kun foje forlasis sian laboron por ekzerci sin laŭ okcidenta maniero. Kiam Ĉefministro Ĝoŭ tion sciis, li admonis ŝin konservi la karakterizaĵojn de alta tono kaj kruda drasteco de la popola kanto en norda Ĉinio kaj de sia propra stilo kaj simpleca senafekta prezent-maniero, por ke la loka spiro estu konceptebla, kaj konsilis ŝin zorgi pri kombinado inter la specialeco de la profesia studo kaj la praktiko sur la scenejo. Tia estis Ĉefministro Ĝoŭ, kiu scipovis zorgeme konduki artistojn ĉiam iri sur la revolucian vojon montritan de Prezidanto Maŭ.

“Kial pli ol dek jarojn ni jam ne aŭdis vin kanti?” Responde al tiu demando Vang Kun indigne rakontis al mi: “Jam en la jaro 1968, mi eksuferis la furiozan persekutadon fare de la karieristino Giang King kaj ŝiaj kunuloj. La sola kaŭzo estis tio, ke foje mi diris: Laŭ la eldiro de Giang King ke oni povas ‘ataki per rezonado’ kaj ‘sin defendi per forto’, tiam kiu plu memoros ‘ataki per rezonado’? Kaj ĉiu sub preteksto de ‘sindefendo per forto’ ekuzos perfortajn rimedojn. Tiu diro ofendis Giang King kaj ŝiajn intimulojn en la kultura departemento. Ili nomis min ‘kontraŭrevoluciulo’, malpermesis al mi aperi sur scenejo kaj limigis mian liberecon. Kiam mi ekzercis la voĉon kun kelkaj kamaradoj, ankaŭ tion ili malpermesis, kalumniante ke ni organizis nin en ‘kontraŭrevolucian voĉmuzikan grupon’. Kaj kiam mi skribis leteron al CK de KPCĉ por sin pledi, ili kulpigis min pri ‘kalumnia denunco kontraŭ centra estro (Giang King) kaj la Kultura Ministerio’ por ‘difendi CK de KPCĉ estrata de Prezidanto Maŭ’ ktp. Pro tio ili min persekutadis eĉ pli peze, deprenis mian politikan rajton kaj min izoligis de ĉio ekstera. Nur en oktobro de 1976, kiam Prezidanto Hua forigis la “kvar fiulojn”, mi estis liberigita. Kial Giang King tiel malamis mian diron? Ĉar ĝi tuŝis ŝian vundpunkton. Per sia slogano “ataki per rezonado kaj sin defendi per forto” ŝi kaj ŝiaj kunuloj volis oponi kontraŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, ke oni devas ‘batali per vortoj sed ne per fortoj’, kaj intencis krei malordojn por kapti la potencon en konfuziteco. Fakte, ne nur mi sola estis persekutita! Kun elkora amo al nia saĝa gvidanto Prezidanto Hua kaj forta malamo al ‘kvarpersona bando’, mi nun povas refoje suriri scenejon, kiun mi forlasis pli ol dek jarojn, kaj plenvoĉe kanti por la popolo. Kvankam mia voĉo ankoraŭ ne tute rebonstatiĝis kaj kantis ne bone, tamen mi ricevis varman aplaŭdon. Mi scias la kaŭzon, ĉar la koroj de ni ĉiuj interkomunikiĝas kaj la sento de la aktoro kaj la spektantoj estas harmonie unuigita. La partopreno en tia prezentado estas granda kuraĝigo kaj profunda edukiĝo por mi. Mi decidas kaj kredas ke mi povas rapide reakiri mian voĉon por daŭre kanti por la popolo.”

Ĝojo de maljuna pentristo

EN la Popola Halo de Pekino pendas granda impona ĉinstila pentraĵo *Kiel Aminda Estas la Patrolando*. Ĝi estas eminenta verko kreita de Guan Ŝanjue kaj Fu Baŭŝi en kunlaboro pri la belaj montoj kaj riveroj de nia patrolando, kiu bildigis la majestan figuron de la socialisma nova Ĉinio.

Antaŭ nelonge ni vizitis la 63-jaran veteranan pentriston Guan Ŝanjue. Li rakontis al ni profundan ŝanĝigon de la antikva ĉinstila pentrarto sub la direktado de la verko de Prezidanto Maŭ Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an.


En la pasinteco la tradicia ĉinstila pentrarto estis grava rimedo por speguli la idelogion de feŭda socio. Monopoligite de la feŭda reganta klaso ĝi servis nur al la malmultaj homoj de tiu klaso. Tiam la pentristoj lertis nur en imitado, sed ne en kreado, kaj ili estis izolitaj de la reala vivo. Nur post publikigo de la nomita brila verko de Prezidanto Maŭ, la ĉinaj kulturaj kaj artaj laborantoj ekhavis lumturon por ilin gvidi en antaŭenmarŝo. Ili konsciencie reformis sian mondkoncepton kaj diligente klopodis por solvi la problemon kiun kaj kiel ili servu. Dank' al tio la ĉinstila pentrarto fariĝis grava instrumento por servi al la proleta politiko kaj al la laboristoj,

kampanoj kaj soldatoj. La vastaj amasoj de profesiaj kaj amatoraj pentristoj energie kreis heroajn figurojn de laboristoj, kampanoj kaj soldatoj, spegulis la profundan ŝanĝon de la granda bela patrolando, tiel ke la ĉinstila pentrarto havigis al si tute novan fizionomion ĉu en enhavo aŭ en formo.

La pentraĵo de Guan Ŝanjue kaj Fu Baŭŝi kun formato 900 × 550 cm estis kreita en 1958 dum konstruado de la Popola Halo. Dum la kreado ili ricevis koran zorgon kaj subtenon de Ĉefministro Ĝoŭ kaj aliaj gvidantoj de la Centra Komitato de KPC. Ĉefministro Ĝoŭ instrukiis, ke la suno en la pentraĵo devas esti relative granda. Vicĉefministro Ĉen Ji instrukiis, ke en la pentraĵo ili devas turni apartan atenton por esprimi "amindecon"; en ĝi devas esti ne nur bildo de norda Ĉinio plenkovrata de glacio kaj neĝo, sed ankaŭ prospera verda bildo de suda Ĉinio; ne nur la bildo de la Granda Muro, sed ankaŭ de la Orienta Ĉina Maro; kaj ili kombinu revolucionan realismon kun revolucia romantikismo.

Post laborado de pli ol kvar monatoj la pentraĵo estis fundamente kompletigita. Antaŭ ol glui ĝin sur papero oni pendigis ĝin en la Popola Halo por peti opiniojn de gvidantoj de CK de KPC. Ĉefministro Ĝoŭ rigardadis ĝin de diver-

Guan Sanjue



saj anguloj, de proksime kaj malproksime. Li kaj aliaj gvidantoj unuanime esprimis kontenton pri ĝi. Malgraŭ okupateco Prezidanto Maŭ faris valoran surskribadon por tiu verko **“Kiel aminda estas la patrolando”**. Rememorante pri tio Guan Ŝanjue diris: “Prezidanto Maŭ surskribis por la pentraĵo. Tio estas ne nur persona honoro kaj feliĉo por ni, sed ankaŭ granda prizorgo kaj kuraĝigo de li al ĉiuj pentristoj de nia lando. Tio estas neforgesebla por mi kaj kuraĝigas min diligente servi per la peniko al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.”

Giang King bone sciis, ke sur la pentraĵo estas surskribado de Prezidanto Maŭ kaj ĝi estas sankciita de Ĉefministro Ĝoŭ kaj aliaj gvidantoj. Tamen ŝi kolere diris en oktobro de 1964: “Mi longe rigardis la pentraĵon de Fu Baŭŝi en la Popola Halo, tamen mi ne scias, kion li pentris. Ĉu ĝi estas tiel bona?” Ŝi ordonis: “Liajn pentraĵojn oni devas kontroli.” Estas tre evidente al kiu ŝi direktis sian lancpin-ton. Tio estas ankaŭ manifestiĝo de ŝia malamo al la principo elmetita de Prezidanto Maŭ **“kune floru cent floroj kaj voĉojn donu cent skoloj”**. Giang King estas nihilisto de la nacia kulturo. Ŝi adoras feŭdismajn, kapitalismajn kaj reviziismajn kulturon kaj arton, sed neas la eminentan tradician kulturon de la patrolando, kaj ĉiamaniere ĉikanis kaj malhelpis la ĉinstilajn pentristojn, tiel ke la lastaj ne sciis kion fari.

Nun la kontraŭpartia “kvarpersona bando” estas frakasita kaj la ĉinaj pentristoj antaŭen-



Himno al Pino kaj Ruĝaj Umefloroj
Ĉinstila pentraĵo de Guan Ŝanjue

marŝas per grandaj paŝoj sub la direktado de la *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*. La maljuna pentristo Guan Ŝanjue kun ĝojo kreis novan gigantan ĉinstilan pentraĵon *Himno al Pino kaj Ruĝaj Umefloroj*. La verko kun Ginggang-montaro kaj neĝmonto kiel fono priskribas fortan pinon kaj densajn prosperajn umeflorojn. Ĝi montras, ke la Komunista Partio de Ĉinio kun glora revolucia tradicio eltenis novan rigoran provon kaj akiris grandan historian venkon.

De kie venas la efekta forto de arto?



La aktoro Ĝang Lianven

EN la n-ro 1 de la pasinta jaro, nia gazeto jam raportis pri la kolora filmo “La Pioniro”. La ĉefa heroo de la filmo estas petrola laboristo Ĝoŭ Tingŝan. Li volus eĉ elbati unu petrolputon per sola pugnofrapo, por forigi la etikedon “manko de petrolo”, kiun almetis al nia patrolando imperiistoj. Lia nobla amo al la patrolando kaj la popolo, kaj lia revolucia spirito de senegoismo kaj sinforĝeso en laborado instigas la ĉinan popolon al obstina batalo por la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado...

Lastatempe ni intervjuis la aktoron, kiu ludis la rolon de la heroo en la filmo.

“Rakontu bonvole, kiel vi ludis la rolon de la heroo Ĝoŭ Tingŝan kun tiel granda efekto?” Ni demandis la intervjuiton Ĝang Lianven, li respondis ridetante: “En tio estis nenio mistera, mi sole faris laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ skribitaj en la *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*. Parolante pri sia kompreno, li diris: “Tre grava estas la problemo, ĉu iu aktoro povas aŭ ne profundigi en la vivon de bazaj amasoj. La socia vivo de la homo estas unika fonto de literatura kaj arta kreado. Antaŭ 35 jaroj, Prezidanto Maŭ jam instruis al ni ke revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj ‘nepre devas iri en la amasojn, nepre devas

iri por longa tempo, senrezerve kaj tutkore inter la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn, en la ardajn batalojn’. Mi ankaŭ kontaktiĝis iom kun amasoj de laboristoj kaj kamparanoj, sed tio ankoraŭ tute ne sufiĉis por modli la heroan figuron de Ĝoŭ Tingŝan. Tial mi iris kune kun mia kolegaro al la petrolkampoj Jumen kaj Daking kaj vivis tie kun la laboristoj pli ol ses monatojn.”

Ĝang Lianven estas juna filma laboranto. Li jam ludis la rolon de la ĉefa heroo en la rakonta filmo «Sunbrila Ĉielo» (legu la artikolon pri ĝi en la n-ro 10, 1974). Antaŭ tio li laboris kiel aktoro de iu loka ensemblo en Ŝanhi-provinco. La loko apartenas al la sama subprovinco kiel Hiĵang-gubernio, fama Daĝaj-tipa gubernio. Dum dek jaroj, kiel membro de la ensemblo li ofte enprofundiĝis en la kamparon, fabrikojn kaj truojn kaj vizitis ĉiujn angulojn de la subprovinco. Ĉie li kune laboris kaj vivis kun laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj por lerni de ili bonajn kvalitojn kaj samtempe faris prezentadojn por ili.

La plej profundan impreson li ricevis tamen en Daking-petrolkampo. Li diris: “Tie mi en ĉiuj momentoj ricevis reedukon de la laborista klaso. Por serĉi petrolon laboristoj batalis sur la senfina stepo, spite al brula varmego kaj rigora frosto, ŝparante nenian penon. En tiea ekspo-

ziciejo mi vidis la malnovan ŝafpeltaĵon uzitan de "Ferhomo" Vang Ginhi dum lia vivo. Por liberigi la ŝtaton de la premo pro manko de petrolo, la heroa veterana laboristo sur petrola fronto sinforĝese batalis dum sia tuta vivo. Iufoje por elimini perturbon de bormaŝino, li en tiu malnova peltaĵo daŭre laboris dum multaj tag-noktoj, mordis sekan manĝaĵon dum malsato kaj fermis okulojn kelkatempe apogante la kapon sur borilkapon kaj streĉe envolvante sin en la peltaĵon dum nevenkebla dormemo. Tiel oni nomis lin "Ferhomo". Li estas la primara modelo de la heroa figuro de Ĝoŭ Tingŝan kaj reprezentanto de herooj de Daking. Tie mi cetere persone ĉeestis la eventon: Iun nokton, subite okazis ŝpruco de puto. Tio okazis en nova regiono, kies subterajn tavolojn oni ankoraŭ ne sufiĉe konis. Se oni ne tuj subpremos la ŝprucadon de subteraj akvo kaj gaso, ne nur la petrolputo ruiniĝos, sed ankaŭ okazos serioza fajrego. La putoŝpruco ja estas ordono. La estro kaj laboristoj de la putobora taĉmento tuj alrapidis al la loko. Por subpremi putoŝprucon, oni devas altigi la baritan proporcion de kotajo. Sen barito oni povas nur uzi cementon kiun oni devas senĉese kirladi por eviti ĝian sedimentiĝon. La estro senhezite saltis en basenon de kotajo profunda ĝis brusto kaj kirlis per siaj korpo kaj superaĵoj. Tiam la apudaj laboristoj faris samon kiel li. Tiel oni sukcesis ĉesigi la putoŝprucon kaj sekurigis la ŝtatajn posedaĵojn. Kiam ni laŭdis la estron de la taĉmento, li ekploris, dirante, ke li ne plenumis bone sian laboron kaj kaŭzis damaĝon al la ŝtato. Lia alta devkonscia sento profunde kortuŝis min. Mi rimarkis, ke tio kion serĉas la laboristoj, estas petrolo, kaj tio pri kio ili pensas, estas la ŝtato. Tia estas ĝuste la nobla penŝaĵo de Ĝoŭ Tingŝan, kiun mi esprimis en la sceno de putoŝpruco de la filmo."

Ĝang Lianven daŭrigis: "Se la figuro de Ĝoŭ Tingŝan donas fortan efekton al la spektatoroj, tio ne estas merito de mia arto, sed la vivo mem kaj sennombraj heroaj personoj, kiuj emocias la spektatorojn. Sub inspirado de arda vivo kaj sub edukado de la noblaj kvalitoj de la laborista klaso, mi, kiel aktoro, profunde sentas respondecon prezenti ilin".

Lerni de

en ludado de

ĜAŬ Janhia estas pekin-opera aktorino. Antaŭe ŝi ĉiam ludis la rolon de sinjorinetoj kaj servistinoj el ĉina feŭda socio, sed nun ŝi ludas la rolon de interligantino de la komunista partio en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito. Por ŝi, tio estas tre granda ŝanĝo.

Kiam ni petis ŝin rakonti sian spertaĵon en tio, ŝi diris: "En la pasinteco mi ne komprenis la diron ke la problemo, por kiu servas literaturo kaj arto, estas fundamenta problemo por literaturaj kaj artaj laborantoj, kaj nur blinde ludis ian ajn rolon. La scenejo de la malnova pekina opero estis regata de sinjoroj kaj sinjorinoj, sinjoretoj kaj sinjorinetoj, dum la popolanoj montriĝis nur feĉo. Tio estas inversigo de la historio. Post la Liberiĝo, la popolo fariĝis mastro de la ŝtato kaj la arta scenejo ankaŭ devas redoni al la historio ĝian propran fizionomion. Sed, sub regado de la kontraŭrevolucia reviziisma literatura kaj arta linio de Liu Ŝaŭki, al la enhavo de pekina opero ĝenerale okazis nenia ŝanĝo. Konsiderinte tion, Prezidanto Maŭ multfoje faris severan kritikon, montrante: "Multaj komunistoj fervore pledas por la arto de feŭdismo kaj kapitalismo, sed ne por tiu de socialismo. Ĉu tio ne estas afero strangeĝa?" Por prosperigi

revoluciulo

ties rolo



Gaŭ Janhia

niajn socialismajn literaturon kaj arton, Prezidanto Maŭ ellaboris serion da proletaj principoj kiel: **“Kune floru cent floroj, kaj elŝovu novon el malnovo”**, **“utiligi la antikvajn en servo al la nuntempo, utiligi la fremdlandajn en servo al Ĉinio.”**

Sankciite de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, en la jaro 1964 okazis la tutlanda festivalo de modernaj pekinaj operoj. Inter la prezentitaj operoj estis «La Fajreroj en Fragmitejoj», en kiu Gaŭ Janhia ludis la gravan rolon de sekreta interligantino. La opero estis prezentata en marto de 1965. Ekde tiam ĝi estis ĉiam sub la zorgado de Prezidanto Maŭ. Li persone sugestis, ke armita batalo devas esti ĝia temo, dirante, ke oni devas kombini la sekretan laboron kun la armita batalo. Rilate al la titolo de la teatraĵo Prezidanto Maŭ opiniis esti preferinda Ŝagiabang, ĉar ĉiuj intrigoj de la teatraĵo okazis en tiu loko. Tiel la opero alprenis la novan nomon.

Sub inspirado de brila instrukcio de Prezidanto Maŭ, Gaŭ Janhia kaj aliaj artistoj profundigis en ardan batalecan vivon de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Ili unuflanke vivis kiel soldatoj en trupoj kaj fizike laboris en la kamparo, kaj

aliflanke reviziis la operon Ŝagiabang. Post preskaŭ unujara klopodado, la opero sursceniĝis kaj ricevis varman akcepton de vastaj popolamasoj.

Ĝuste en tiu tempo, karieristino Giang King ŝovis sian manon en la operon. Kvankam ŝi ne projektis eĉ unu intrigon de la opero, nek verkis aŭ reviziis eĉ unu vorton en dialogoj, nek kreis eĉ unu arion por ĝi, tamen ŝi rabis al si la frukton de laborado de aliaj, senhonte dirante, ke la opero estas farita sub ŝia direktado, kaj per tio neis la grandajn meritojn de Prezidanto Maŭ en gvidado de la revolucio de pekinaj operoj. Ŝi aparte tiranis senbride kontraŭ dramistoj, reĝisoroj kaj aktoroj kaj senskrupule fabrikis falsajn atestojn por kulpigi ilin kiel “kontraŭrevoluciojn”. Nun, post frakaso de la “kvarpersona bando” la vastaj rondoj de literaturaj kaj artaj laborantoj sentis sin duafoje liberigitaj. Gaŭ Janhia ĝoje esprimis, ke ŝi pretas daŭre prezenti novajn modernajn revoluciajn pekin-operojn por ludi rolon de revoluciuloj dum sia tuta vivo.

“Rododendro” ĉe la piedo de Ĉangbaj-montaro

— PRI LA ARTISTA TRUPO DE HELONG-GUBERNIO

EN la regiono de Ĉangbaj-montaro en nord-orienta Ĉinio, oni ofte vidas grupon da gejunuloj piedirantaj sur malglata montvojo, kunportante muzikilojn kaj pakajojn. Ili estas geaktoroj de la artista trupo de Helong-gubernio de la Janbian-a Kore-nacieca Aŭtonoma Subprovinco de Gilin-provinco, sur vojo al prezentado por laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. La lo-

kanoj nomas ilin “rododendroj” ĉe la piedo de Ĉangbaj-montaro.

Rododendro estas sovaĝa floro de Ĉangbaj-montaro. En komenciĝo de printempo la karmezina rododendro ekfloras kontraŭ neĝa vento. Oni ofte donacis ĝin al siaj intimuloj kiel simbolon de revolucio kaj bondeziro. Sed kian rilaton havas rododendro kun la artista trupo?



Kantistino Huang
Jenŝun kantas “La
Janbian-a Popolo
Amas Prezidanton
Maŭ”.

VARMA PRIZORGO

En frosta vintro, la geaktoroj de la trupo eniris en praarbaron de Ĉangbaj-montaro, por prezenti al arbohakistoj revoluciajn kantojn kaj dancojn. Pro neĝo, la kruta montvojo estis glitiga kaj malfacile irebla. La geaktoroj kuntordis velkintajn herbojn en ŝnurojn por ligi siajn ŝuojn. Kiam la antaŭirantoj glitfalas, la postirantoj ilin retenis per mano, kaj tiamaniere ili daŭre marŝis antaŭen manon en mano.

De malproksime arbaraj laboristoj jam vidis ilin kaj kriis gaje: "Alvenis nia artista trupo!" Ili renkonte kuris al la aktoroj kvazaŭ al intimoj kaj invitis la lastajn en la domon. Apenaŭ oni fintrinkis glason da varma teo, la aktoroj kaj la laboristoj kune forbalais la neĝon por aperigi ebenan spacon en la korto kiel scenejon. Antaŭ la prezentado la respondeculo de la laborejo diris: "Estas malvarme kaj ventego, do iom kantu en surtutoj." Aktoro Malgranda Gin diris: "Por prezenti al laboristoj, ni sentas varmecon en nia koro malgraŭ la malvarma vetero." Por mildigi al ili la froston, arbohakistoj ekbruligis lignokarbon sur la tereno. Sed la fajro varmigis nur la bruston, la dorson tamen malvarmigis la vento. Iuj laboristoj meminciate staris dense post la ludantoj por ŝirmi al ili la frostan venton. Ĉiufoje, kiam aktoroj finis sian programeron, la laboristoj tuj metis siajn surtutojn sur la aktorojn. La prizorgado de la laboristoj efikis sur la geaktoroj kiel movforto kaj la lastaj plenvoĉe kantis kun granda emocio.

Iu maljuna laboristo diris kun larmoj en la okuloj: "En la pasintaj jaroj, kiam rododendro floris, printempo jam venis. Sed en la kuranta jaro, antaŭ ol rododendro ekfloras, vi jam portis al ni varmon kaj prizorgon de la Partio kaj Prezidanto Maŭ!"

ZIGZAGA VOJO

Tiu ĉi artista trupo fondiĝis en la jaro 1958. Sub la regado de la reviziisma literatura kaj arta linio de Liu Ŝaŭki, ĝi apartiĝis de laboristoj kaj kamparanoj, nemalmultaj el ĝiaj prezentaĵoj estis dekadencaj muzikaĵoj de feŭdaj kortegoj kaj

molecaj dancmovoj. Tiuj estis tute ne akordaj kun la ardaĵ socialismaj revolucio kaj konstruado. Foje ĝi venis al iu popola komunumo, jam en la komenco de prezentado la komunumanoj trovis ke la prezentado tute ne konvenis al ilia gusto, kaj pli poste sursceniĝis ebrulo, kiu malbeligis la figuron de malriĉkamparanoj. La komunumanoj kolere protestis: "Kial vi ne prezentas revoluciajn kantojn kaj dancojn? Al kiuj vi ja servas?" Iu onklino diris al solistino de kantado Huang Ĵenŝun: "Knabino, vi havas belan voĉon, sed malbelaj estis la kantoj. Vi devas kanti kantojn, kiuj kuraĝigas la aŭskultantojn!" Iu maljuna malriĉkamparano diris al aktoro Gin Fenghaŭ: "Vi muzikisto komponu kantojn, kiuj povas elverŝi la varman amon de la Janbian-a popolo al Prezidanto Maŭ, tian amon ni ja havas en nia koro por Prezidanto Maŭ!"

La senkaŝa kritiko kaj varma espero ekbrulis kiel fajro en la koroj de la geaktoroj. Vespere, ili runde sidis, por ripetade studi la verkon de Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* kaj pripensis lian instruon: "Niaj literaturo kaj arto estas por la **popolamasoj, antaŭ ĉio por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kreitaj por kaj utiligataj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.**"

En varme disvolvita diskutado ili diris: "La laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj konsistigas la plejparton de nia loĝantaro kaj estas la ĉefa parto de nia lando, nur prezenti ilin estas la ĝusta direkto de la socialisma literaturo kaj arto." "Ni devas krei kantojn kaj dancojn plej ŝatatajn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, spegulantaj la ardan batalan vivon en la socialismaj revolucio kaj konstruado." Post klopodado de pluraj monatoj, kun profunda amo fine Kamarado Gin Fenghaŭ sukcesis komponi la kanton *La Janbian-a Popolo Amas Prezidanton Maŭ*, kiu spegulas la varman senton de pli ol 1,700,000 Janbian-anoj al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Ĝuste en tiu tempo, la Granda Proleta Kultura Revolucio disvolviĝis tra la tuta lando. Ekbolis ankaŭ la artista trupo de Helonggubernio. La geaktoroj leviĝis por kritiki la reviziisman literaturan kaj artan linion de Liu Ŝaŭki. La respondeculo de tiu trupo diris dolore:

“Antaŭe, mi opiniis, ke prezentado en la kamparo signifas plenumon de la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ kaj servon al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Sed la enhavo de la prezentitaj programeroj ne tute estis socialisma. Kia doloriga leciono!”

NOVA VOJO

En la granda kultura revolucio, tiu ĉi artista trupo reorganizigis kaj ĉefe okupiĝis pri kantado kaj dancado. Ĝia membraro nombriĝas je 47, kiuj devenis de la naciecoj korea, hana, manĉua kaj huja. Sub la direktado de la nacia politiko de la Partio ili vivas en solidareco kaj frateco. Observante la instruon de Prezidanto Maŭ “**iri ... senrezerve kaj tutkore inter la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn, en la ardajn batalojn**”, ĉiujare ili faras prezentadon kaj fiziklaboron 7-8 monatojn en la kamparo. Tie ili havas siajn amikojn kaj “hejmojn”. Tuj alveninte tien, ili transplantas rizplantojn aŭ falĉas maturajn rizplantojn kun komunumanoj, aŭ kune studas marksismajn-leninismajn verkojn aŭ kune kritikis reviziismon. Ĉiufoje post reveno de la kamparo granda ŝanĝiĝo okazis al la geaktoroj. Huang Ĵenŝun diris: “Antaŭe, nemalmultaj el la kantoj kantitaj de mi havis burĝan guston, kiujn la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ne volis aŭskulti, sed mi opiniis ke la kaŭzo estas ilia malalta nivelo de arta aprezado. Post kiam mi vivis kelkan tempon inter ili, mi ekkomprenis, ke tio estas kaŭzita de miaj malĝustaj penso kaj sento, de mia erara starpunkto.” En la lastaj jaroj, la partia filio de la trupo persistis pri la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ, kaj kuraĝis revolucii kaj praktiki. Ĉiufoje post reveno de la kamparo, ĝi instigas la geaktorojn turni la fruktojn akiritajn en la kamparo en movforton de kreaj laboroj kaj plene utiligi diversajn art-formojn en servado al la socialismaj revolucio kaj konstruado. Ekde la Granda Proleta Kultura Revolucio, ili verkis pli ol 140 programerojn, kiujn ili konstante prezentas en la pli ol 120 produktaj brigadoj de la 16 komunumoj de la tuta gubernio, en proksimaj fabrikoj kaj minejoj kaj al limdefendaj trupoj.

En la lasta aŭtuno ili venis al iu riverordiga konstruejo, kiu estas unu el la ĉefaj akvoutiligaj konstruejoj de la gubernio en lerno de Daĝaj en agrikulturo. La geaktoroj faris rondiran prezentadon laŭ digoj de pli ol 80 km.

Ruĝigas mil aŭroraj nuboj la riverojn, montojn,

Printempo brilas ĉe Hajlan-river’.

*Per niaj propraj fortoj ni konstruas nian landon,
La font’ de niaj fortoj estas pens’ de Maŭ Zedong.*

Tio estis la kanto *La Brilo de la Partio Prilumas Janbian*, kiun la konstruantoj verkis kaj prezentis por si mem.

Post finiĝo de la bela kanto, la duopa kore-nacieca danco *Maljunaj Geedzoj Alportas Manĝaĵon* komenciĝis kun akompano de muziko. La avo portas per vekto paron da siteloj kaj la avino portas surkape kuvon da rizo, rapidante al la konstruejo. Infektita de la bolanta laborfervoro, la maljuna paro ekvolas ankaŭ sin ĵeti en la laboron. La lertaj dancmovoj kaj la efektivaj figuroj ensorĉis la spektatorojn, iuj ekkantetis akompane, aliaj ekdancis laŭ la ritmo de la muziko.

La arto, kiu prezentas la revolucian batalon de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, estas plej komprenebla kaj akceptebla por ili kaj fariĝis forto puŝanta ilin antaŭen. Iu aktoro rakontis jenan anekdoton:

Iufoje, onklo Gin rigardis la dancon *Maljunaj Geedzoj Alportas Manĝaĵon* kaj estis multe korduŝita. La sekvantan tagon, li ne iris al foiro, sed iris tuj post ellitiĝo kolekti sterkon por la produkta taĉmento. Ankaŭ lia najbaro onklo Cuj, post rigardo de la danco, frue ellitiĝis por kolekti sterkon por la taĉmento, sed li ellitiĝis ne tiel frue kiel onklo Gin kaj pensis en si ke li morgaŭ ellitiĝos pli frue ol Gin. Je la tria tago onklo Cuj vere ellitiĝis antaŭ ol Gin. Je la kvara mateno, la du onkloj denove renkontiĝis, sed apud onklo Gin aldone estis lia malgranda nepo, kiu pasigis ĉe li somerajn feriojn.

Vang Venli, kiu ludas la rolon de la maljunulo en la danco, diris: “La reala vivo de lerno de


Daĝaj en agrikulturo edukis nin, tiel ke ni povis krei tiun dancon relative efektivan.” La danco estis kreita en 1976, prezentita en Pekino ĉe la internacia laborfesto kaj laŭdata de ĉefurbaj spektatoroj kaj fremdlandaj amikoj.

BONDEZIRO

Printempa festo estas tradicia festo de la ĉina popolo. En tiu tago la parencoj kaj amikoj renkontiĝas por ĝoje pasigi la feston. Sed la geaktoroj ĉiuj proponis iri al kamparo por tie pasigi la feston kune kun malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezĉamparanoj. Post alveno al la kamparo leviĝis la problemo, kie oni aranĝu la scenejon. Iu diris, ke la trupo uzu la scenejon de la elementa lernejo, alia proponis ke oni mem starigu ĝin en korto. Ili pensis, kiel oni povas pli-proksimigi sin al la komunumanoj. Post longa cerbumado, ili ekpensis ke la terlito de koreanoj okupas kutime plejparton de ĉambro. Ili do simple prenis ilian terliton kiel scenejon. Ili rapide dividiĝis en plurajn grupojn por prezenti al ĉiu aparta familio. Gajaj kantonoj kaj muziko tuj leviĝis super la vilaĝo. La koreanoj estas ĝenerale lertaj en kantado kaj danco. Cetere estis bela festo. La vilaĝanoj estis pli plenaj de ĝojo. Onkloj surportis sian longan tamburon kaj kantis kaj dancis kune kun la geaktoroj, kaj virinoj elprenis siajn memfaritajn kukojn por regali ilin.


Tiutempe, ili aŭdis ke iu onklino ankoraŭ ne spektis ilian prezentadon, iuj geaktoroj do tuj iris al ŝia domo kaj speciale prezentis por ŝi. Komence, Huang Ĵenŝun staris kontraŭ ŝi, la onklino diris, ke ŝi ne povas klare aŭdi la kanton pro sia malbona aŭdo, Huang Ĵenŝun do sidis apud ŝi kaj ĉe ŝia orelo kantis *La Janbian-a Popolo Amas Prezidanton Maŭ*. La onklino kortuŝiĝis ĝis larmoj kaj, firme premante la manon de la aktorino, diris: “Knabino, vi kantis bone, la kanto esprimis nian koron. Mi ĝojas kvazaŭ mi vidus rododendron.”

Kiam ili forlasis la vilaĝon, komunumanoj amase iris ekster la vilaĝon kaj longe ne volis hejmenreveni, rigardante la forirantajn geaktorojn.



Lerni de popolaj kantistoj

Trupo iras al montanoj por prezentado.



Virinoj en la Blua Ĉielo

LA unua generacio de aviadistinoj de la nova Ĉinio jam flugis 25 jarojn.

Okaze de la virina festo de la 8-a de Marto en 1952, tiuj knabinoj kiuj vivis mizere en la malnova socio, venintaj el diversaj provincoj flugis per aviadiloj en la bluan ĉielon por ricevi revuadon de Prezidanto Maŭ kaj la popolo de la ĉefurbo. Prezidanto Ĝu De kaj aliaj gvidantoj ĉeestis la inaŭguron de ilia flugado sur la aerodromo en la okcidenta antaŭurbo de Pekino. Kiel emociiĝis tiuj aviadistinoj, kiam ili transflugis Tian-anmen-pordegon kaj Ĝongnanhaj, la sidejon de CK de KPĈ! Ili pensis: Ho Prezidanto Maŭ, vi gvidis la ĉinan revolucion al venko, liberigis nin virinojn el suferoj kaj havigis al ni ferajn flugilojn.

Iun tagon post la 8-a de marto, aŭtobuso veturigis ilin al Ĝongnanhaj. La granda gvidanto Prezidanto Maŭ akceptis ilin.

Rigardante ilin afable, Prezidanto Maŭ demandis al respondeca kamarado apude staranta: “Ĉu ili estas esperigaj?”

“Jes.”

Aŭdinte la respondon, Prezidanto Maŭ kontente kapjesis. Li sidiĝis kaj lasis foti lin kune kun ili. La kara foto registris la feliĉon, gloron kaj fierindaĵon de la aviadistinoj. La kora zorgo de Prezidanto Maŭ kuraĝigis ilin en antaŭenmarŝo.

Post penema ekzercado de certa tempo, la unuaj pilotinoj de la nova Ĉinio komencis unu-

ope plenumi flugajn taskojn unu post alia. Huang Bijun, kiu foje larmis en la aviada lernejo pro timo, ke ŝi malsukcesos en lerno de pilotado, estis laŭdata de Vicĉefministro He Long en plenumado de fluga tasko.

Foje, ŝi flugis al iu loko por plenumi taskon. Surteriĝinte ŝi iris al la direktejo por raporti pri sia plenumita laboro. Apenaŭ ŝi enpaŝis la oficejon, Kamarado He Long demandis ŝin afable: “Vi venis en la ĝusta momento. Kiel vi nomiĝas?”

“Huang Bijun,” ŝi alpaŝis kaj salutis lin.

“Bone, ni veturu revene per via aviadilo.”

“Ne, ne, mia gvidanto,” maltrankvile diris Huang Bijun, aŭdinte ke Kamarado He Long volas veturi per ŝia aviadilo, “granda aviadilo alflugos por veturigi vin, iom atendu kaj baldaŭ ĝi alvenos.”

“Ni havas urĝan aferon, ni ne povas daŭre atendi.” Tion dirante li mansvingis al siaj sekvantoj: “Iru, ni ascendu la aviadilon.”

Survoje, Kamarado He Long venis en la antaŭan kajuton kaj kore interparolis kun ŝi. Kiam la aviadilo transflugis monton aŭ riveron, Kamarado He Long demandis ŝin, ĉu ŝi scias iliajn nomojn. Huang Bijun ĉiufoje donis jesan respondon.

“Ha, vi estas eĉ vivanta mapo! Vi ja bone konas la aviadan linion. Kial vi ne volis ke mi veturu per via aviadilo?”

Huang Bijun ekridis ĝoje. Ŝi lerte stiradis kaj la aviadilo flugis senskue. Kiam la aviadilo atingis la cellokon, Kamarado He Long diris al Huang Bijun premante ŝian manon:

“Bone vi stiris, kaj mi veturos per via aviadilo en la venonta fojo.”

En la batalo por defendi kaj konstrui la patrolandon, la unuaj aviadistinoj de la nova Ĉinio faris sian kontribuon. Sub ilia influo kaj stimulo rapide kreskis ankaŭ la duaj aviadistinoj.

En printempo de 1957, Ĉen Ĝijing kaj aliaj el la unuaj aviadistinoj ricevis la taskon de kulturado de la duaj pilotinoj. En la kunveno por bonvenigi la novulojn, iu knabino kuris al Ĉen Ĝijing, premante ŝian manon, diris: “Franjo Ĉen, ĉu vi ankoraŭ memoras min?” Ĉen Ĝijing rigardadis ŝin kun rideto kaj streĉe traserĉis sian memoron.

“Ĉu vi forgesis? Mi prezentis al vi bukedon je la 8-a de Marto de 1952, okaze de la inaŭguro de via ekflugado.”

“Ho! Kiam vi demetis la ruĝan koltukon! Tiam vi ankoraŭ vokis nin per onklino!” La vortoj de Ĉen Ĝijing ekridigis ĉiujn aliajn.

Huang Hiuking diris iom honte: “Tiutempe mi jam decidis lerni de vi. Estas interese, ke nun mi vere alvenis ekster mia atendo! Franjo, diru ĉu mi sukcesos ellerni flugadon?”

“Certe! Tiel bonajn kondiĉojn vi havas por lerni.” Ĉen Ĝijing diris al ŝi kiel la unuaj pilotinoj lernis kaj kiel ili venkis la renkontitajn malfacilojn, kaj parolis al ili pri la vojo irita de la unuaj aviadistinoj sub zorgado de la Partio, kiun la ĉinaj virinoj neniam iris en la pasinteco. “Multe pli bonajn kondiĉojn nun vi havas,” ŝi diris. “Nun mankas al ni neniu ekipaĵo kaj estas multaj instrumentoj, kaj krome vi estas kleraj, do vi povos lerni pli rapide.”

La spirito de la malnovaj pilotinoj en batalo kontraŭ malfaciloj multe kuraĝigis ilin. Ili plenumis sian lernadon kun granda sukceso. En la komenco de 1959, tiuj knabinoj jam komencis flugadi kune kun siaj pliaĝaj fratinoj.

En 1960, pilotino Vang Jun kaj ŝiaj kamaradinoj de la aviada grupo el la duaj pilotinoj veturigis Ĉefministron Ĝoŭ al alia loko. Post kunvenado de tuta tago, Ĉefministro Ĝoŭ prenis vespermanĝon kune kun la membroj de la aviada grupo. Kun pokalo en la mano li tostis kun



Vang Jun (dekstre), vicbrigadestri-
no de iu aviada trupo de la aera
armeo studas la “Elektitajn Verkojn
de Maŭ Zedong”.

ili. Irinte al pilotinoj Vang Jun kaj Hju Gjunking, li demandis: "Kie vi naskiĝis?" Vang Jun diris: "Mi devenis de Gaŭjoŭ de Giangsu-provinco." Ĉefministro Ĝoŭ ekridetis kaj diris: "Do ni estas samlokanoj!" Kaj Hju Gjunking diris: "Mi devenis de Huaj-an-gubernio!" Ĉefministro Ĝoŭ diris ĝoje: "Eĉ pli proksimaj samlokanoj ni estas!" Kaj li prezentis ilin al sia edzino Kamaradino Deng Jingĉaŭ.

En la 23-a de decembro, 1974, Vang Jun refoje veturigis Ĉefministron Ĝoŭ per sia aviadilo. Descendinte la aviadilon, Ĉefministro Ĝoŭ diris premante ŝian manon: "Vi estas pilotino kaj bone plenumis la stiradon!" Lia laŭdo al ŝi esprimis lian prizorgon kaj esperon al la aviadistinoj.

La aviadistinoj ne vanigis la esperon de la popolo. En la pasintaj pli ol 20 jaroj, kreskadis kun ĉiu tago la vicaro de la aviadistinoj sekve

de la disvolviĝo de la aviada afero de nia lando. Inter ili troviĝas virinoj, kiuj almozadis en la malnova socio, ruĝgvardianoj plenkreskintaj en la Granda Proleta Kultura Revolucio, filinoj de karboministoj kaj filinoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ili kreskadas kaj plenumadas taskojn kune kun la viraj kolegoj. Iuj el ili fariĝis gvidantoj kaj aliaj fariĝis reprezentantoj de la Tutlanda Kongreso de la Partio aŭ reprezentantoj de la Tutlanda Popola Kongreso. Nemalmultaj el ili faris gravan kontribuon kaj fariĝis avangardaj laborantoj. En 1960, ili ricevis de la Tutlanda Virina Federacio la honoran titolon Ruĝflaga Kolektivo de la 8-a de Marto. Ili veturigis per siaj aviadiloj internaciajn amikojn, delegaciojn de frataj landoj kaj plenumis gravajn taskojn de paraŝutigado, transportado de helpaĵoj al suferantoj de katastrofo, savado de fiŝistoj, protektado de forstoj kaj kunagado kun frataj trupoj en milita ekzercado.



TRI GEOLOGIAJ MAPOJ ELDONIĜIS

"Tektoniko-sistema Mapo de la Ĉina Popola Respubliko", "Geologia Mapo de la Ĉina Popola Respubliko" kaj "Geologia Mapo de Azio", re-

daktitaj de la Ĉina Geologia Akademio en kunlaboro de provincaj geologiaj burooj kaj institutoj kaj altaj lernejoj, jam estas eldonitaj de la Eldonejo de Mapoj kaj distribuataj de Hinhua-librejo.

La "Tektoniko-sistema Mapo de la Ĉina Popola Respubliko" (1:4,000,000) estas redaktita laŭ la geomekanika teorio kaj metodo de la ĉina eminenta geologo Li Siguang. Ĝi relative komplete spegulas la fundamentajn karakterizaĵojn de la tri tektoniko-sistemoj de nia lando, la estiĝon kaj disvolviĝon de ili kaj la interrilaton inter ili. Ĝi estas valora referencaĵo por studo pri tektoniko de aliaj regionoj de la mondo. La "Geologia Mapo de la

Ĉina Popola Respubliko" (1:4,000,000) koncentre spegulas la sukcesojn atingitajn de nia lando en geologia laboro kaj montras nian novan nivelon en tiu sfero. Nun ni jam fundamente ne havas regionon geologie ne prospektoritan. Tiu mapo ludos gravan rolon en produktado, instruado kaj scienca esploro. La "Geologia Mapo de Azio" (1:5,000,000) estas redaktita post sinteza analizado de relative novaj geologiaj materialoj de la aziaj landoj kaj regionoj laŭ la vidpunkto kaj metodo de dialektika materiismo. Tiu ĉi mapo klare spegulas la geologiajn karakterizaĵojn kaj strukturan konturon de Azio.




Nova fizionomio de Gialing-rivero

Gialing-rivero fontas el Kinling-montaro, fluas tra suda Ŝenhi, suda Gansu kaj Siĉuan inter la montaroj Daba kaj Gianmen, trapasas basenon de meza Siĉuan kaj fine kunfluas kun Jangzi-rivero en Ĉongking. Ĝi longas je pli ol 1,100 kilometroj kaj la areo de ĝia baseno estas 160.000 kvadrataj kilometroj. Kiel unu el la grandaj branĉoj de Jangzi-rivero, ĝi estas nur malpli longa ol la rivero Hanŝuj kaj ĝia akvokvanto estas nur malpli multa ol tiu de Mingiang-rivero. Ĉiusekunde ĝi elverŝas al Jangzi-rivero 1.970 kubmetrojn da akvo.

Antaŭ la Liberiĝo, la reakciaj regantaj klasoj neniam ordigis ĝin, tial navigado en Gialing-rivero estis tre malfacila pro mallarĝeco, malprofundeco de la riverlito, danĝeraj malprofundajoj kaj rifoj. Tiam malgranda boato povis navigacii sur ĝiaj kelkaj partoj, kaj navigado kontraŭ fluo tute dependis de homa tirado. Tie estis nenia ŝosea ponto super la rivero, nek hidraŭlika elektrejo, nek irigacia instalaĵo. Dum okazo de superakvo digoj falis, kampoj subakviĝis kaj domoj ruiniĝis. La rivero alportis nur katastrofon al la ambaŭborda laboranta popolo.

Post la Liberiĝo, kun prospera disvolviĝo de la socialisma konstruado de nia lando granda ŝanĝiĝo okazis al Gialing-rivero kaj ĝiaj basenoj. Nun ĝi ligiĝas kun la fervojo de Baŭgi ĝis Ĉengdu en sia supra baseno, kaj kun la fervojo de Ĉengdu ĝis Ĉongking en sia malsupra baseno. Fervojaj kaj ŝoseaj pontoj konstruiĝis unu post alia super la rivero. Dank' al ordigo de la riverlito, konstruado de digoj, forigo de danĝeraj malprofundajoj kaj rifoj kaj instalado de navigaciaj signaliloj, pasaĝeraj kaj varaj motorŝipoj povas navigacii sur ĝi en tuta jaro. Nemalmultaj ŝiptiristoj pasintaj fariĝis nun stiristoj aŭ ŝipestroj. Nun Gialing-rivero surportas novan veston.



Hidroelektrejo ĉe la rivero en konstruado

Ponto super la rivero







Ĝeng Pejliang, kiu tiris lignajn ŝipojn sur Gialing-rivero kelkdek jarojn en la pasinteco, nun estas stiristo de motora ŝipo.

Ĉaŭtianmen-kajo de Ĉongking ĉe la kunfluejo de la riveroj Gialing kaj Jangzi








Unu el irigaciaj konstruaĵoj ĉe la rivero



Nova teĝardeno en montregiono





Traktoroj kuras al laboro.



Riĉa rikolto de silk-
raŭpaj kokonoj

Unu el la silkaj tek-
sejoj de Nanĉong
apud la rivero kiu
famiĝas pro silkaj-
produktado.




Printempo venas en la kamparon.





La petrolistoj sukcese boris la unuan puton de nia lando ĉe la riverbordo kun profundeco de 6011 metroj. Jen laboristoj de la putobora taĉmento diskutas pri laboro.

Olerafinejo apud la rivero



Prezidanto Maŭ estas granda savanto de la ĉina popolo

de la Giahian-gubernia Komitato de KPC

*Ruĝas la oriento,
Leviĝas la suno,
En Ĉinio aperis Maŭ Zedong;
Li laboras por feliĉigi la popolon,
Li estas granda savanto de la popolo.*

.....

En la jaro 1942, Li Joŭjuan, kantisto de la laboranta popolo de Giahian-gubernio de Ŝenhi-provinco, verkis kaj la unua kantis tiun imponan kanton kiu esprimas senliman amon de nia popolo al Prezidanto Maŭ kaj komunan korvoĉon de centmilionoj da laboruloj. De tiam jam forpasis 34 jaroj. En la tago, kiam la malĝoja informo pri la forpaso de Prezidanto Maŭ atingis la naskiĝlokon de la kanto, popolanoj kun larmoj venis antaŭ la kaverndomon iam loĝatan de Prezidanto Maŭ en manovrado en norda Ŝenhi kaj sur la montvojon de li iritan por rememori lian batalan vivon de 98 tagnoktoj en tiu loko kaj la jarojn de revolucia batalo de la popolo de norda Ŝenhi sub la gvido de Prezidanto Maŭ.

En la jaro 1947, Prezidanto Maŭ venis al nia gubernio, postlasis ĉie siajn piedsignojn kaj ekbruligis revolucionan torĉon en la koro de miloj kaj centmiloj da popolanoj. Maljuna kompartiano Guo Junhian de Ŝenkjuan-brigado rememoris, kiel Prezidanto Maŭ direktis la batalon ĉe Ŝenkjuan. Li diris: "Ho, prezidanto Maŭ! Vi plej bone komprenis kaj amis la popolon, vi estas savanto de la popolo. Tiu tempo, kiam vi venis al Ŝenkjuan, estis ĝuste rikolta sezono. Tuj post via

alveno vi mobilizis ĉiujn laborantojn de la centraj institucioj, ke ili helpu popolamasojn en rikoltado. En sezono de semado, kiam vi informiĝis ke tritiksemo mankis al multaj kamparanoj pro rabado de la bando de Ĉiang Kajŝek kaj pro atako de naturaj katastrofoj, vi tuj sendis pli ol 60 kg. da tritiko ŝparita de la manĝejo de la nomitaj institucioj al 12 familioj de armeanoj kaj malriĉkamparanoj. Tio ne estis ordinara semo, sed semo de feliĉo kaj de revolucio!"

Maljuna malriĉkamparano Ĉen Ĝanfu de Vuĝen-brigado rememoris pri sia interparolado kun Prezidanto Maŭ. Li diris: "En la militaj jaroj Prezidanto Maŭ zorgis tute ne pri si mem, nur pri la popolamasoj. Antaŭ la muelilo de nia korto li demandis min, ĉu la lokanoj forlasis sian domon kaj suferis damaĝon kiam la malamikoj alvenis." Kiam mi diris al li, ke la malamikoj forrabis ĉion de ni, li diris al mi, ke la malfaciloj estas provizoraj, kaj la tagoj de la malamikoj ne povas daŭri longe. Kvankam jam forpasis 29 jaroj de tiam, tamen ĉiu vorto de Prezidanto Maŭ ankoraŭ restas kvazaŭ gravurita en mia koro. Ekpensante pri tio, mi ĉiam sentas en mi senfinan forton.

La kamparanoj de Nanhedi, kiun Prezidanto Maŭ iam vizitis, neniam forgesos, ke en la 21-a de oktobro de 1947 li venis inter ilin, kune kun ili kolektis fazeolon, kore interparolis... Je la tago en kiu Prezidanto Maŭ forlasis la lokon, li donacis al ili kelkajn mantukojn kiel memoraĵojn. En ĉiu tuko kristaliĝis lia senlima amo al la popolamasoj!

La popolo de Giahian-gubernio neniam forgesos, ke Prezidanto Maŭ persone ellaboris sub lamplumo dum multaj noktoj en Ĝuguanĝaj la strategian principon por la dua jaro de la Liberiĝa Milito, gvidis la armeon kaj popolon de la tuta lando por turni la strategian defensivon en strategian ofensivon, mem direktis la faman kampanjon ĉe Ŝagiadian en norda Ŝenhi, forte batis la arogantecon de la bando de Ĉiang Kajŝek kaj Hu Zongnan kaj per tio ŝanĝis la militan situacion de nordokcidenta Ĉinio. En Ŝenkjuan Prezidanto Maŭ faris la alvokon **“Faligu Ĉiang Kajŝek kaj liberigu la tutan Ĉinion”** kaj anoncis al ni la aŭron de liberigo de la tuta lando. En la monturbo Giahian Prezidanto Maŭ propramane skribis por

nia partia organizo la vortojn **“Staru ĉe la flanko de la plejparto de la laboranta popolo”**, por ke ĝi ĉiam tiel agu.

Hodiaŭ, laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, la kadroj de ĉiuj niveloj de nia gubernio iris al bazaj unuoj kaj tie partoprenas en kolektiva produktado por teni intiman rilaton kun la amasoj. Direktate de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, nia gubernio konstruis multajn digojn kaj ŝtuparajn kampojn, kaj per tio beligis la lokon. Ĉiufoje kiam ni ekpensas ĉion ĉi tion, ni senlime karmemoras la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ. La popolo de nia gubernio firme decidis bone fari la revolucion kaj produktadon laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.



Kora Interparolado (ĉinstila pentraĵo)

de Liu Venhi

Alte flirtas la flago de popola komunumo

NIA Kilijing-a Popola Komunumo, kiu situas en Hinhiang-gubernio de Henan-provinco, estas unu el la plej frue starigitaj komunumoj de nia lando. Kiam la popola komunumo komencis ĝermi, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ tuj varme subtenis ĝin por ke ĝi kresku fortike. Ĉiufoje kiam la membroj kaj kadroj de nia komunumo ekpensas tion, ili pli sopire memoras lin.

Estis en la jaro 1958. Sub la prilumado de la ĝenerala linio de la Partio “streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie”, ni starigis en Kilijing popolan komunumon en la alta tajdo de la granda impeto de la tuta lando. Je la 6-a de aŭgusto de 1958 — la trian tagon post la fondiĝo de nia komunumo, Prezidanto Maŭ venis al ni por inspekti persone.

Estis serena tago post pluvo, la aero estis aparte freŝa. Je la 23-a minuto post la kvara, posttagmeze, kelkaj aŭtomobiloj ekhaltis sur la centra placo de nia vilaĝo. Unu altstatura homo iris el la unua aŭtomobilo, kun rideto li paŝis al la komunuma oficejo. “Ho, Prezidanto Maŭ!” Inter la homamasoj leviĝis varma manplaŭdo kaj vivuoj. Tuj ekboliĝis la placo. La krio “Vivu Prezidanto Maŭ!” sonis ĝis nuboj. Kiom da homoj jam longe sopiris kaj deziris vidi lin. Nun, li venis al ni persone. Kiel la Kilijing-anoj povis ne entuziasmiĝi kun ĝojego!

Ĉe la pordo de la komunuma oficejo, Prezidanto Maŭ ekvidis la nomtabulon de la komunumo, atente rigardis ĝin kaj mallaŭte voĉlegis vorton post vorto: “Kilijing-a Popola Komunumo de Hinhiang-gubernio.” Gvidanto de la gu-

bernia partia komitato diris al li, ke ĝi estas la unua popola komunumo de la tuta gubernio. Li kapjesis kaj diris kun rideto, ke la nomo popola komunumo estas bona.

Kiam Prezidanto Maŭ enpaŝis en la korton kaj vidis du nomtabulojn de “Politika Fako” kaj “Meteologia Fako” apud pordoj de ĉambroj en la kontraŭa flanko, li demandis al ni: Kio estas tio? Ni respondis: Ĝi estas Universitato por Revolucio kaj Kvalifikiĝo fondita de la komunumo. Kun interesiĝo li demandis: Kiu estas ĝia direktoro? Ni respondis: La sekretario de la komunuma partia filio. Poste, Prezidanto Maŭ enpaŝis la kunvenan ĉambron de la komunumo.

En la kunvena ĉambro ni raportis al Prezidanto Maŭ la staton de la komunumo en diversaj flankoj. Li atente aŭskultis nin kaj fojerefoje laŭdis: La popola komunumo estas bona. Lia vorto vekis longan kaj varman aplaŭdon.

Rifuzinte pli longan ripozon, Prezidanto Maŭ komencis inspektadon. Informiĝinte, ke la komunumo havas Hejmon de Maljunuloj, kiuj estas solaj sen parencoj, li diris ke li volas unue viziti la maljunulojn. Kiam li paŝis en la maljunulan domon, dekoj da gemaljunuloj rapidis el la ĉambroj. Pli-ol-70-jara Li Hjueĝeng, al kiu la malnova socio senigis la familion kaj parencojn, nun pasigas feliĉe siajn lastajn jarojn en la domo. Ekde la tago de Liberiĝo, li jam deziris vidi la savanton Prezidanton Maŭ. Nun, li ja vere vidis lin. Kiom da vortoj li ja volis diri, sed li mutis firme premante la manon de Prezidanto Maŭ, povante diri nenion kaj larmis pro troa emociiĝo. Salutante la maljunulojn, Prezidanto Maŭ zor-

Prezidanto Maŭ
inspektas la popo-
lan komunumon en
Henan.



geme demandis al la komunuma direktoro Lju Ŝumo: Ĉu la gemaljunuloj estas kontentaj pri la hejmo? Kiam la lasta diris, ke ili estas tre kontentaj, Prezidanto Maŭ ekridis. Poste, li vizitis la infanĝardenon. Dekoj da naivaj kaj viglaj infanoj kuris al li kaj kriis: "Saluton al Prezidanto Maŭ!" Prezidanto Maŭ

afable karesis la infanojn, kaj la etuloj ekkantis sian ŝatatan kanton *Post Plenkresko Ni Povos Konstrui Bone la Patrolandon*. Prezidanto Maŭ laŭdis la kantadon de la infanoj kaj esprimis dankon al la vartistinoj.

Laŭ la bezonoj de la granda impeto de la agrikultura produktado, nia komunumo starigis

nombrojn da malgrandaj fabrikoj. Veninte al la farunmuelejo de la komunumo, Prezidanto Maŭ rigardis la funkciadon de maŝinoj kaj zorgeme demandis: Kiom da mueliloj la fabriko havas? Ni respondis: Kvar. Li atente rigardis la farunkribradon kaj prenis plenmanon da brano kaj ekzamenis, ĉu la faruno estas tute elkribrita. Poste, li iris en la globlagran fabrikon, tiam ni produktis ŝtalajojn permane forĝitajn. Li rigardis la produktan procedon kaj keston da ŝtalaj globetoj kaj kontente laŭdis la malgrandan fabrikon. Liaj kuraĝigo kaj laŭdo montris al ni la direkton por bone funkciigi la popolan komunumon kaj iom post iom kreskigi la kolektivan ekonomion.

La vetero estis tre varma. Post forlaso de la fabrikoj, ni konsilis al Prezidanto Maŭ iom ripozi. Sed li insiste volis rigardi kotonplantojn. Preterpasinte kampojn de dense kreskantaj fabokaj melon-plantoj, ni kune venis al kotona kampo. Rigardante la verde ondantajn kotonplantojn, li demandis pri la vasteco de tiu kampo, la kvanto de donita sterko por ĉiu muo kaj la celita pomua produkto, kaj pri la areo de tiaj kampoj de la komunumo. Kamarado Lju Ŝumo respon-

dis tiujn demandojn unu post alia. Kun vigla interesiĝo Prezidanto Maŭ disigis la branĉojn kun densa foliaro kaj multaj kotonfruktoj kaj diris kun rideto: Kiel eniri! Li malrapide enŝovis sin en la kotonplantaron altan je ŝultro, ĉirkaŭrigardis la kunirantojn kaj laŭdis la bone kreskantajn kotonplantojn. Poste, li ekkaŭris por nombri la fruktajn branĉojn kaj kotonfruktojn de unu planto.

“Tie en la fronto estas eksperimenta kampo de kadroj,” ni montris al li pli prosperan kotonkampojn. Li iris al la montrita kampo. Tiam, liaj vangoj ŝvitis kaj la ĉemizoj malsekiĝis. Iu gvida kamarado petis lin reveni por iom ripozi, sed li diris: Ne, ni rigardu iom pli, iom pli.

En kotonaj kampoj, la komunumaninoj, kiuj ŝprucigis insekticidon, varme manplaŭdis al li, kiam ili vidis lin. Prezidanto Maŭ intime petis ilin demonstri la ŝprucadon. Poste, li laŭdis ilian laboron.

Sur alia kotonkampoj, komunumaninoj estis forplukantaj la pintojn de kotonplantoj. Prezidanto Maŭ foje-refoje svingis la manon al ili kaj iris inter ilin por fari la samon. Vidante tion, ni ĉiuj estis tre emociitaj.



Kunveno de Kilijing-komunumo por resumi sperton de lerno de Daĝaj en agrikulturo


Revenvoje al la vilaĝo, rigardinte la bone kreskantajn plantojn Prezidanto Maŭ diris signifiplene, ke ĝi estas multe esperiga! Poste li daŭrigis: Estus bone, se la kamparo de la tuta lando ĉie estas tia. Jam aperis unu tia komunumo, aperos multaj aliaj.

Kiam Prezidanto Maŭ revenis al la vilaĝo, sur stratoj kaj vojkruciĝoj svarmis homamasoj, la vilaĝanoj ĉiuj volis propraokule vidi la grandan gvidanton estimatan kaj amatan. Ĉie kien Prezidanto Maŭ iris, ekbolis homamasoj. Li foje kaj refoje svingis la manon al la ĝojkriantaj amasoj kaj intime manpremis al la starantoj en

la unua vico. Kiam la aŭtomobiloj malrapide forlasis nin, li ankoraŭ mansvinge adiaŭis el la aŭtomobilo la amasojn.

La tute nova socia organizformo — popola komunumo, kvazaŭ matena suno, prilumas la direkton de la ĉinaj kamparanoj en antaŭenmarŝo. Prezidanto Maŭ montris: **“Pli preferende estas starigi popolajn komunumojn, ĝia supereco estas tio, ke estas eble meti industrion, agrikulturon, komercon, edukon kaj milicion en unu tuton kaj tio faciligas la gvidadon.”** Sub la direktado de tiu granda alvoko, la popolaj komunumoj kiel montaj floroj rapide disvolviĝis tra la tuta Ĉinio.

Riĉa rikolto de kotono en Kilijing-komunumo



Alte tenante la grandan flagon de popola komunumo, la kadroj kaj komunumanoj de la Kilijing-a Popola Komunumo faris sensanceliĝan batalon kontraŭ la reviziisma linio de Liu Saŭki, Lin Biaŭ kaj la “kvarpersona bando” de 18 jaroj. Surbaze de la bona rikolto en sinsekvaj 13 jaroj, nia komunumo atingis la grenan produktokvanton de 750 kg, po muo en la lasta jaro.

Nun, niaj komunumanoj daŭre disvolvas la movadon de lerno de Daĝaj en agrikulturo kaj ĝeneraligo de la Daĝaj-tipa gubernio. Ili decidis pli bone funkciigi la popolan komunumon por ke alte flirtu la ruĝa flago de popola komunumo starigita de Prezidanto Maŭ!

** La verkinto Tian Hiu-king estas sekretario de la partia komitato de la Kilijing-a Popola Komunumo.*



de raportistoj de EPC

NOVAJ AFEROJ SUR LA MARBORDA LINIO

En la lastaj kvar jaroj, konstruiĝis sinsekve sur la marborda linio de Ĉinio kvar petrolaj havenoj, nome la Petrola Haveno de Kinhuangdaŭ, la Petrola Haveno de la Dalian-a Nova Haveno, la Huangdaŭ-a Petrola Haveno de Kingdaŭ kaj la Petrola Haveno de Ĝangiang. Ili estas la unuaj petrolaj havenoj konstruitaj de nia lando, kaj ili estas ame nomataj “novaj aferoj sur la marborda linio”.

Kiel naskiĝis la “novaj aferoj”? Kion signifas ilia apero?

Ĉirkaŭ la fino de la pasinta jaro, ni faris vojaĝon laŭ la norda marbordo de nia lando kaj vizitis la tri petrolajn havenojn de Kinhuangdaŭ, Dalian kaj Huangdaŭ. En la pasinteco, ni vizitis multajn havenojn de Ĉinio kaj delonge sopiradis vidi petrolajn havenojn de nia lando. Fine efektiviĝis nia espero, kaj ni faris la vizitadon kun granda intereso kaj ĝojo. Ĉie kien ni alvenis, oni prezentis al ni la eksterordinarajn ŝanĝojn kun helpo de mapo. Kiam ili faris komparon de hodiaŭo kun la pasinteco, ili ĉiam havis multon por diri kaj montris fieran senton pri la sukcesoj.

Ĉinio havas multajn bonajn golfojn sur sia marborda linio kun longeco de pli ol 18,000 kilometroj. Tamen en la marbordaj havenoj de la malnova Ĉinio troviĝis nur tre malmultaj profundakvaj ankrejoj kaj neniu petrola kajo estis trovebla. Tiam la reakciaj regantoj okupiĝis nur

pri ekspluatado de la ĉina popolo en koluziado kun imperiistoj, ne zorgis pri ekspluatado de la petrolaj riĉfontoj de nia lando, nek disvolvis la nacian ekonomion. Ili tute ne pensis pri konstruado de petrola haveno, kredante la opinion, ke “Ĉinio estas malriĉa je petrolo”. Post la Liberiĝo, la ĉina popolo fariĝis mastro de sia sorto kaj sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, ĝi refunkciigis, plivastigis kaj konstruis nombron da havenoj kaj kajoj. Kun la senĉesa disvolviĝo de la industria kaj agrikultura produktado, multiĝo de vizito de internaciaj amikoj al nia lando, senĉesa kreskado de la internacia komerco kaj la kvanto de mara transporto, la ankrejoj de la havenoj multe ne povis kontentigi la bezonon. Sekve de la sukcesa ekspluatado de Daking-olekampo en la sesdekaj jaroj, nia lando ekhavis superbezonan petrolon. Pli poste, ni ekspluatis la novajn petrolkampojn de Ŝengli kaj Dagang, reformis kaj disvolvis la malnovajn petrolkampojn de Jumen kaj Karamaji. La rapida disvolviĝo de la produktado de petrolo pli urĝe postulis laŭeble rapidan disvolvon de mara transportado de nafto.

Por plenumi la bezonon, en 1973 Ĉefministro Ĝou Enlaj elmetis laŭ la penso de Prezidanto Maŭ la alvokon: “Ŝanĝu la fizionomion de la havenoj en tri jaroj.” Tiu kuraĝiga alvoko tuj ricevis fortan respondon tra la tuta lando. Ekde tiu jaro, laŭ unueca plano de la ŝtato kaj sub energia subtenado de la koncernaj departementoj, la marbor-

daj provincoj, urboj kaj aŭtonoma regiono komencis grandskalan konstruadon de havenoj. Dum la periodo de 1973 ĝis 1975, konstruiĝis pli ol 40 novaj ankrejoj por ŝipoj kun kapacito de pli ol 10,000 toneloj, pli multe ol la profundakvaj ankrejoj konstruitaj dum la 23 jaroj de 1950 ĝis 1972. Kaj la finkonstruo de la kvar petrolaj havenoj malfermis novan vojon de transportado de nafto en nia lando kaj akcelis la disvolviĝon de nia nacia ekonomio kaj internacia komerco.

Parolante pri tiuj sukcesoj, oni ankoraŭ pli sopire memoras Prezidanton Maŭ kaj Ĉefministron Ĝoŭ. La tagoj kiam ni vizitis Kinhuangdaŭ, ĝuste estis la unua datreveno de la forpaso de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj. Laboristoj invitis nin ĉeesti ilian memorigan aktivadon. Ili kunvenis, prezentis filmojn kaj publikigis murgazetojn por memorigi la grandajn kontribuojn de Ĉefministro Ĝoŭ kaj lian zorgon pri la konstruado de havenoj, kaj firme decidis labori pli energie kaj efektive ankoraŭ pli grandan disvolvon de la havena konstruado antaŭ 1980.

ĈE LA FINO DE LA UNUA OLETUBA LINIO

La Petrola Haveno de Kinhuangdaŭ estas la unua petrola haveno konstruita de nia lando. Ĝi troviĝas ĉe la fino de la unua oletuba linio de nia lando por transporto de nafto de Daking.

Ni ekveturis de Pekino nordorienten per trajno kaj post 6 horoj atingis Kinhuangdaŭ.

Kvankam estis frosta vintro, tamen en la vivplena petrola haveno iris intensa laborado. De malproksime sur la bordo ni vidis, ke dikaj oletuboj, tuboj por malpura akvo, akvo kaj vaporo kaj telekomunikaj dratoj estas instalitaj ĉe unu flanko de la viadukto ĝis la pornafta kajo ĉe la fino de la viadukto. Iuj oceanaj oleŝipoj estis ŝarĝataj per nafto ĉe la kajo, dum aliaj plensarĝitaj oleŝipoj malrapide forlasis la havenon. Sur la bordo, brilis en la vintra sunlumo arĝentaj olecisternoj kaj novaj konstruaĵoj por laboro kaj loĝado.


“Nia petrola haveno estas malpli granda ol tiuj de Dalian kaj Huangdaŭ,” ĝoje diris al ni Guo Benju, respondeculo de la Konstrua Komando de la Haveno de Kinhuangdaŭ, serena

kaj parolema mezaĝulo, “sed ĝi estas la unua petrola haveno konstruita de nia lando, tial ĝi havas apartan signifon.” Li rakontis al ni la konstruadon de la haveno.

Grandskala konstruado de la Petrola Haveno de Kinhuangdaŭ komenciĝis en 1973. Tie estis malferma golfo sen ŝirmo kontraŭ vento kaj ondoj. Antaŭe iuj opiniis, ke konstrui tie petrolan kajon kun komplika teknologio kaj granda laborkvanto bezonas almenaŭ 3 jarojn. Sed kiam la konstrua komando de la haveno rakontis al la laboristoj pri la bonega situacio de nia petrola industrio kaj la tuta nacia ekonomio kaj informis al ili la instrukcion de Ĉefministro Ĝoŭ pri konstruado de la haveno, ili forte ekscitiĝis, sentis sin glorita de la partopreno en la konstruado de la unua petrola haveno kaj decidis finkonstrui ĝin en unu kaj duona jaro.

En tiu tempo, nenio troviĝis sur la malplena marbordo. Al la miloj da laboristoj subite kolektiĝintaj ĉe la konstruejo prezentiĝis malfaciloj eĉ en manĝo kaj loĝado. Sed ili tute ne maltrankviliĝis pro tio. Ili diris: Se la Daking-anoj efektivigis sian altan aspiron elterigi petrolon per kreitaj kondiĉoj pene luktante en malfaciloj kaj forjetis la etiketon pri “malabundeco de

Ekfunkciis la petrola kajo de Dalian



petrolo” de Ĉinio en Pacifikon, ni haven-konstruaj laboristoj certe povos finkonstrui petrolan havenon por senĉese elporti nafton tra ĝi. En la pasinteco, la entreprena unuo devis ebenigi la konstruejon, alkonduki akvon kaj elektron kaj pretigi ĉiajn necesajn kondiĉojn, alie la konstrua trupo ne eniris en la konstruejon. Ĉifoje la laboristoj tute rompis la regulon kaj partoprenis en preparado por la konstruado sur la dezerta marbordo.


Por konstrui petrolan kajon granda nombro da kasonoj kaj diversaj ferbetonaĵoj estis bezonataj, inter kiuj ĉiu el la ferbetonaj traboj longas je 32 metroj kaj pezas je pli ol 80 tunoj. Pro manko de sperto, la laboristoj ricevintaj la taskon de farado de tia trabo elspezis 40 tagojn por elfari la unuan trabon. Poste, dank’ al senĉesa teknika renovigo ili mallongigis la produktan periodon de ĉiu trabo ĝis 7 tagoj. Sed tia rapideco ne povis garantii ĝustatempan finkonstruon de la petrolo kajo. La laboristoj persiste faris eksperimentojn, venkis multajn teknikajn malfacilojn kaj mallongigis la periodon ĝis 1 tago, tiamaniere ili plenumis la bezonon de la konstruado.

Samtempe kun plenumo de la surmara konstruado, la laboristoj plenumis ankaŭ instaladon de serio da kompletigaj instalaĵoj surteraj kaj

instalitis diversajn tubliniojn kun totala longeco de 35 kilometroj. De la ebenigado de la konstruejo kaj meto de la unua bazoŝtono de piliero ĝis la finkonstruo kaj ekfunkcio de la petrolo kajo forpasis ĝuste unu kaj duona jaro.

La ĝojiga novaĵo pri la finkonstruo kaj ekfunkcio de la Petrolo Haveno de Kinhuangdaŭ rapide disvastiĝis kvazaŭ printempa zefiro. Aparte emociiĝis la maljunuloj komparante la pasintecan kun la hodiaŭo. Ili diris al ni, ke en Kinhuangdaŭ konstruiĝis la unua kajo kaj la unua fervojo de Ĉinio en 1900. Sed tio estis nur tragediaj signoj pri la senrajteco kaj sklaveco de la ĉina popolo. La tiama simpla kaj malbone ekipita haveno de Kinhuangdaŭ estis konstruita de ĉinaj laboristoj devigate de britaj imperiistoj por forrabi la karbon riĉfonton de Kajluan en ĝia najbareco. Dum ekspluatado de la karbomino kaj konstruado de la fervojo kaj haveno, sennombraj ĉinaj laboristoj mortis pro malsato, laciĝo, batado kaj akcidentoj. Nun ŝanĝiĝis la epoko. La ĉina popolo, kiu fariĝis mastro de sia ŝtato, disvolvas la produktadon kaj maran transportadon celante nenion alian ol konstrui sian patrolandon, disvolvi egalrajtan komercon kun ĉiuj amikaj landoj kaj subteni la revoluciajn popolojn de la mondo.

Celebro de la finkonstruo kaj ekfunkcio de la Petrolo Haveno de la Dalian-a Nova Haveno



La sukcesa finkonstruo de la Petrola Haveno de Kinhuangdaŭ montris la grandajn volon kaj forton de la ĉina laboristaro kaj kuraĝigas la konstruantojn de aliaj novaj petrolaj havenoj de nia lando.

ĈE LOKO POR IMPORTO DE FREMDLANDA PETROLO EN LA PASINTECO

La dua loko de nia vojaĝo estis Dalian, kiu situas ĉe la suda ekstremo de la Liaŭdong-a Duoninsulo, kontraŭe al Kinhuangdaŭ trans Bohaj-mar, ĝia tera kaj mara trafikado estas tre oportuna. La petrola haveno situas ĉe la Blenia Golfo je 60 kilometroj fore de la urbo, kaj la lokanoj nomas ĝin Petrola Haveno de la Blenia Golfo. Oni diras ke tie abundas je blenioj.

La gvidisto diris al ni, ke ĝi estas la plej granda, plej profunda kaj teknike moderna petrola haveno de la nuna Ĉinio. Ĉe ĝia fino estas kajo ĉe kiu povas ankriĝi du ŝipoj, unu kun kapacito de 50,000 toneloj kaj alia kun kapacito de 100,000 toneloj. Ĝi povas enŝipigi 10,000 tunojn da nafto en ĉiu horo. La kajo estas ekipita per ŝarĝiloj de petrolo, eskalatoroj por ascendi kaj descendi ŝipon kaj elektrajn vinĉojn. Kaj ankaŭ la kajo por laboraj ŝipoj jam komencis sian servadon. Konstruaĵoj por produkta laboro, eksterlandaj aferoj kaj administrado estas pretigitaj. Nova lumturo kun alteco de 34 metroj estas konstruita sur insuleto kaj alta signalo-domo staras sur la bordo. Finkonstruiĝis ankaŭ baseno de 30,000 kubometroj por traktado de malpura akvo, ŝoseoj, elektraj kaj telekomunikaj linioj kaj instalaĵoj por provizado de akvo.

Kiam ni iris sur la kajon, du fremdlandaj oleŝipoj ĉe la ankrejoj estis ŝarĝataj. Tion vidinte ni tuj ekpensis pri la pasinteco de la Dalian-a Haveno. Ĉiuj kiuj konas la historion de tiu haveno scias, ke ĝi estis unu el la havenoj tra kiuj la malnova Ĉinio multe importis fremdlandan petrolon. Tiam importitaj petroloj kun la markoj de Shell Oil Co., Texas Oil Co. kaj American Asiatic Oil Co. plenigis la vastan merkaton de la ĉinaj urboj kaj kamparo kaj eĉ loĝantoj en limregionoj kaj malfacile atingeblaj vilaĝoj devis akiri, kontraŭ feloj kaj ovoĵoj, kerosenon fremdlandan por lumigado.

Hodiaŭ, konstruiĝis ĉe Dalian nia plej granda petrola haveno por transportado de nia nafto. Por ĉiam forpasis la historio de importado de fremdlanda petrolo al Ĉinio.

En konstruado de la petrola haveno oni aplikis la konstruajn spertojn de la petrolaj havenoj de Kinhuangdaŭ kaj Ĝangiang, sed ankaŭ prezentigis al ĝi novaj problemoj, kiujn la konstruantoj devis mem solvi. Ekzemple, unuafoje oni aplikis en nia lando la teknologion de tute veldita interne malplena truso en konstruado de la ŝtala viadukto kun 100-metraĵ spanoj.

Aparte interesis nin tio, ke la viadukto kaj la profundakva kajo estis projektitaj de la projekta grupo konsistanta el laboristoj, kadroj kaj instruistoj kaj studentoj de la Dalian-a Politekniko, kiuj faris praktikadon ĉe la konstruejo. La instruistoj kaj studentoj de la politekniko, kiuj partoprenis en la projektado, jam forlasis la petrolan havenon, tamen rakontoj pri ilia rimarkinda laboro ankoraŭ cirkulas inter la laboristoj.

Frue jam en printempo de 1973, dekoj da studentoj de la akvoutiliga fakultato kaj matematika-mekanika fakultato de la nomita lernejo venis al la Blenia Golfo sub gvido de la instruistoj. Ili faris praktikadon eksterlernejan en ligo kun elektado de konvena loko por la haveno, mezurado kaj projektado. Spite al vento kaj pluvo ili piediris tra valoj kaj trans montoj, faris enketadon al kamparanoj kaj fiŝistoj, akiris grandan kvanton da rektaj materialoj kaj ellaboris projekton pri la nova haveno, kiun sankciis la supera instanco.

Nun tiuj studentoj devenintaj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj jam estas diplomitaj kaj iris al diversaj lokoj de la lando por partopreni en socialisma konstruado. Ni vidis en la Dalian-a Politekniko Profesoron Kian Linghi, Liu respondecis pri projektado de la viadukto. Li jam estis pli ol 60-jara blankharulo, sed li aspektis vivecplena. Li diris, ke li instruadis dekojn da jaroj per scioj el libroj kaj tute ne atendis, ke li povis havi ŝancon partopreni en praktika konstruado. Li sentis grandan feliĉon pro tio, ke li povis fari sian malgrandan kontribuon al la socialisma konstruado en siaj maljunaĝaj jaroj. Profesoro Kian ne volis multe paroli pri si mem

kaj ĉiam emfazis la helpojn kiujn la laboristoj donis al li. Li diris, ke por finplenumi la konstruadon en mallonga tempo, antaŭ ĉio oni devis fari projekton konforman al la principo konstrui multe, rapide, bone kaj ekonomie. Tiam li analizis la tri formojn de kunigo tute per boltoj, kombino de boltado kaj veldado kaj kunigo per ŝraŭboj kaj veldo en kombino, aplikatajn en konstruado de ŝtalaj pontoj en la pasinteco kaj opiniis, ke kvankam bonan sperton oni jam havas en tio, tamen la konstrua periodo devas esti tro longa. Se oni aplikos la teknologion de tute veldita truso 100-metra kun malplena interno, oni povas ŝpari kaj tempon kaj materialon kaj krei viadukton pli belan kaj pli racian en mekano. Sed en nia lando oni ankoraŭ ne havis sperton en konstruado de tia larĝspana ponto. Iu rimarkigis lin, ke estas danĝere tion fari kaj se li malsukcesos, li ne nur trafos malhonoron sed ankaŭ devos respondi pri la granda perdo.

Profesoro Kian diris kun forta emocio, ke en la pasinteco eble li unue pripensus tion. En tiu tempo, eĉ modifo de lia projekto estis konsiderata kiel malhonoro, por ne paroli pri malsukceso. Sed nun kiel li povis konsideri pri sia persona honoro, vidante ke la laboristoj sinforgese penlaboregas unuanime tage kaj nokte por frue finkonstrui la petrolan havenon. Por fari sian projekton pli konforma al la realo, li iris al fabrikoj de Dalian kaj multaj aliaj lokoj kun siaj projektaj desegnaĵoj por peti konsilojn de laboristoj. Laboristoj varme subtenis lin kaj kuraĝigis lin dirante, ke antaŭe la ŝipoj estis tute




Veldistinoj

boltitaj, sed la nunaj jam estas tute velditaj, kial do ni ne povas rompi la malnovan regulon en konstruado de viadukto? Ili ankaŭ elpensis multajn ideojn en velda tekniko por helpi la profesoron. Fine, lia projekto estis sankciita.

En la konstruado, la laboristoj laboris plene energie, eĉ post la dejoraj horoj, plene disvolvis siajn saĝon kaj kapablon, venkis la malfacilon de nesufiĉeco de konstruaj maŝinoj kaj instrumentoj kaj ĝustatempe finkonstruis la longan ŝtalan viadukton en la ondanta Bohaj-mar.

(Daŭrigota en la sekvanta numero)



La Petrola Haveno de Kinhuangdaŭ



Rememore al hinda amiko D-ro Kotnis

FORPASIS jam 34 jarojn D-ro Kotnis, intima amiko de la ĉina popolo, granda internaciisma batalanto kaj elstara filo de la hinda popolo. Por memorigi liajn elstarajn farojn en Ĉinio, la ĉina popolo konstruis memorhalon por li, kies solena inaŭguro okazis en la 9-a de pasinta decembro.

AL ĈINIO POR BATALI KONTRAŬ LA JAPANA AGRESO

En la 7-a de julio, 1937, la japana imperiismo lanĉis grandskalan agresan militon kontraŭ Ĉinio. En la sekvinta tago la Komunista Partio de Ĉinio faris al la tuta lando deklaron pri batalo kontraŭ la japana agreso kaj trovis aprobon

de la diversnacieca popolo de la tuta Ĉinio kaj ankaŭ simpatian kaj subtenon de la mondaj popoloj. Tiam, D-ro Kotnis, kiu laboris en la hospitalo sub la Bombaja Medicina Instituto, jam preparis sin por plenumi eniran ekzamenon de la Brita Reĝa Medicina Societo. Kiam li informiĝis ke Hindio sendos medicinan taĉmenton al Ĉinio por subteni ties kontraŭjapanan rezistmiliton, li rezolute forlasis la ekzamenon kaj sin anoncis por veni al Ĉinio.

La hinda medicina taĉmento atingis Vuhan en la 30-a de septembro de 1938, kaj ricevis varman akcepton de la Vuhan-a Oficejo de la Okavoja Armeo. En la bon-

veniga kunveno Kamarado Je Gianjing kaj estro de la taĉmento sinsekve faris paroladojn, kiuj esprimis la firman volon de la ĉina kaj hinda popoloj en batalo kontraŭ la japana agreso. En la 7-a de oktobro Kamarado Ĝoŭ Enlaj akceptis ilin kaj analizis al ili la internacian situacion kaj detale eksplikis la strategiajn principojn de Prezidanto Maŭ pri la Kontraŭjapana Rezistmilito. Tio multe ilin kuraĝigis. Kun aparta decidemo rebati la japanan faŝismon D-ro Kotnis iris al Jan-an. Kiam la taĉmento estis preta ekstarti, D-ro Kotnis subite ricevis informon, ke lia patro forpasis. Sed li esprimis: "Neŝanĝebla estas mia decido iri al Jan-an!" Li skribis al sia familio: "Mi esperas ke mia vojaĝo al nordo ebligos al mi propraokule vidi potencon politikan forton sur la nuna internacia scenejo — komunismom."

En la 22-a de januaro, 1939, la medicina taĉmento rompis ĉiujn obstaklojn metitajn de kuomintangaj reakciuloj kaj ekiris sur la vojon al Jan-an. Por memori la brilan vojon simbolantan la amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj Hindio, antaŭ la starto ili aldonis la ĉinan vorton "Hua" (kiu signifas Ĉinion en la ĉina lingvo) malantaŭ sia nomo. Post longa vojaĝo, en la 12-a de februaro, 1939, la medicina taĉmento fine atingis la tage kaj nokte sopiratan revolucion sanktejon Jan-an, kaj ricevis varman akcepton de la granda gvidanto

En la Memorhalo de D-ro Kotnis



Inaŭguro de la Memorhalo de D-ro Kotnis



de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ kaj jan-anaj armeanoj kaj popolo.

BRAVE BATALI SUR LA FRONTO

En 1939, la japanaj agresantoj koncentris grandan forton kaj furioze atakis niajn liberigitajn regionojn. Ankaŭ la kuomintangaj reakciuloj en akordo kun la japanaj invadantoj fabrikis “kontraŭkomunistajn eventojn” kaj ĉie surprizatakis postfrontajn oficejojn de nia armeo. En tia situacio, Prezidanto Maŭ alvokis al la limregionaj armeanoj kaj popolanoj **“iri al la fronto kaj al la postfronto de la malamikoj por tie ataki kaj ekstermi ilin”**. Profunde kortuŝite de la alta revolucia pasio de armeanoj kaj popolanoj de la liberigitaj regionoj D-roj Kotnis, Basu kaj aliaj tuj postulis ke la gvida instanco permesu al ili iri al la postfronto de la malamikoj. En la 29-a de oktobro, Prezidanto Maŭ speciale invitis la medicinan taĉmenton al

tagmanĝo. Dum la manĝado, Prezidanto Maŭ diris al ili, ke Ĉefkomandanto Ĝu De jam telegrafis el Ŝanĥi, ke ili bonvenigos la taĉmenton al la fronto! Pro tio tre ĝojis Kotnis kaj aliaj kaj postnelonge jam rapidis al la batalfronto.

Kiam la medicina taĉmento venis al la Ĉefkomandejo de la Okavoja Armeo en Vuĥiang-gubernio, Ŝanĥi-provinco, Ĉefkomandanto Ĝu varme bonvenigis ilin kaj longe parolis kun ili pri la monda situacio kaj la ĝenerala situacio de la kontraŭjapana batalekampo, pri la ĉefa sperto de la ĉina gerila milito kontraŭjapana. Ĉio ĉi tio ravis kaj profunde emociis ilin. Kiam D-ro Kotnis atingis la fronton, ĵus ekstartis la batalo en Ĝangdian. Li kaj aliaj tuj starigis frontan kuracejon. Dum la batalado obuso detruis murangulon de la kuracejo. Por ilia sekureco oni konsilis lin transloki la kuracejon iom fore de la fronto. Li tamen diris: “Se translokiĝo de la kuracejo sekurigos

nin, tio tamen aldonos kiom da suferoj kaj danĝero al soldatoj sentimaj pri sangado kaj vivofero!” Tion dirinte, li daŭrigis streĉan operaciadon al vunditoj malgraŭ la bombardo de la malamikoj. Tiamaniere la batalo daŭris pli ol unu tagon kaj D-ro Kotnis laboris senĉese pli ol 40 horojn kaj kune kun aliaj kamaradoj faris bandaĝojn kaj operaciojn al pli ol 80 vunditoj.

En majo de 1940, D-roj Kotnis kaj Basu venis al la milita regiono de Ŝanĥi-Ĉahar-Hebej. Postnelonge akriĝis la batalo en postfronto de la malamikoj. Konsentite de la supera instanco, D-ro Basu gvidis operacian grupon al la norda fronto, dum D-ro Kotnis al la suda. En batalo, D-ro Kotnis ree faris kurachelpojn sur la batalekampo. Dum 13 tagoj, la operacia grupo sub lia gvido akceptis pli ol 800 vunditojn kaj faris operacion al 558 vunditoj. Foje la trupoj dum transirado estis surprize atakitaj de malamikaj aviadiloj. Vidinte ke iuj vundiĝis, D-ro Kotnis tuj sentime alsaltis por

savi siajn kunbatalantojn antaŭ ol la malamikaj aviadiloj forflugis. D-ro Kotnis laboregis tage kaj nokte malgraŭ laciĝo. Tion rimarkinte ĉinaj kamaradoj admonis lin atenti sian farton kaj fari necesan ripozon. Li diris: “Nia devo estas protekti la sanon de la soldatoj, savi kaj kuraci vunditojn por akiri venkon de la revolucio.” La hardado de la batala vivo en la fronto portis profundan ŝanĝiĝon al la penso de D-ro Kotnis. Li ĝoje diris al ĉinaj kamaradoj: “Kvankam mi ne havis ŝancon studi en la Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato, tamen mi vivas en la Okavoja Armeo, kiu estas ankaŭ ia novtipa batala universitato.”

TUTKORE SERVI AL LA POPOLO

En aŭgusto de 1940, D-roj Kotnis kaj Basu venis al Gegong-vilaĝo de Tanghian-gubernio, Hebej-provinco kaj laboris tie en la Bethune-a Higiena Lernejo kaj ĝia hospitalo. Jam en Jan-an, D-ro Kotnis informiĝis, kiel D-ro Bethune aktive organizis medicinan taĉmenton por servi al la fronto. En la milita regiono de Ŝanhi-Ĉahar-Hebej li persone partoprenis en la soleno de finkonstruo de la Maŭzoleo de D-ro Bethune, kaj kun respekto li oferis florkronon al tiu ĉi granda internaciisma batalanto. En 1941, D-ro Kotnis akceptis la postenon de direktoro de la Bethune-a Internacia Paca Hospitalo, kiu ĵus fondiĝis. De tiam, li ripetade legis la brilan verkon de Prezidanto Maŭ *Memore al Norman Bethune* kaj de tempo al tempo informiĝis de malnovaj kamaradoj pri ties revoluciaj faroj. Li decidis labori kiel Bethune, kun ekstreme alta devkonscio al laboroj kaj ekstreme varma koro al kamaradoj kaj popolo, ĉie kaj ĉiam traktis sin kiel

simplan soldaton de la Okavoja Armeo en vivado. En Jan-an D-roj Kotnis kaj Basu jam mem tondis harojn unu al la alia kaj vivis kiel ordinara soldato. Kaj en la fronto li amuzis sin, laboris kaj batalis kune kun ĉiuj aliaj. Li tre ŝpare uzis siajn vestojn kaj ŝuojn por donaci la nove ricevitajn al vunditoj kaj aliaj kamaradoj, kaj li mem ofte portis vestaĵojn kun flikaĵoj. Aliaj laŭdis lian spiriton de mallukso, li tamen diris, ke kompare kun Prezidanto Maŭ lia vivo estas multe pli bona kaj ke li venis ja por revolucio sed ne por komforta vivo.

En intensaj bataloj kontraŭ “balaado” de la malamiko, D-ro Kotnis ĉiam estis kaj komandanto kaj batalanto. Antaŭ translokiĝo li persone faris mobilizan paroladon, movis amasojn por fari brankardojn kaj organizi transportan trupon. Kaj dum transirado, li ĉiam sekvis la brankardojn kaj zorgis vunditojn. Kvankam la vivo estis tre streĉa kaj malfacila, tamen D-ro Kotnis ĉiam havis bonan humoron. Li diris: “Kvankam mi ĉi tie vivas neniam antaŭe spertitan vivon, tamen mi sentas min plena de vicleco kaj ĝojo. Mi amas Ĉinion kaj amas ĝiajn armeanojn kaj popolanojn, kiuj brave batalas per neelĉerpeblaj fortoj kontraŭ ĉiaj harstarigaj faŝismaj krimoj!”

Kun arda fervoro D-ro Kotnis zorgis ĉiun pacienton. Foje preterpasante iun vilaĝon, li subite aŭdis ĝemadon de iu virino. Li tuj serĉis la ĝemanton. En ĉambro prirabita de la japanaj invadintoj, li trovis ŝin. Li informiĝis de la malsanulino, ke ŝia edzo jam iris al la fronto, la vilaĝo estis ĵus katastrofe invadita de malamikoj kaj ŝi grave suferanta pro nenormala akuŝado. Tio kreskigis al D-ro Kotnis simpatian al la ĉina

popolo kaj malamon al la japanaj imperiistoj. Li tuj serĉis en proksimeco gerilanojn, portigis la pacientinon al provizora kuracejo kaj rapide donis kuracajn helpojn, tiel ke la patrino kaj bebo estis ĝustatempe savitaj.

FARI ĈION EBLAN POR LA POPOLO ĜIS LA LASTA SPIRO

Post veno al Ĉinio D-ro Kotnis ekhavis pli profundan konon pri la ĉina revolucio kaj grandan interesiĝon pri studo de Marksismo-Leninismo kaj la verkoj de Prezidanto Maŭ.

En Jan-an li jam komencis studi verkojn de Marks kaj Lenin. En 1942, nia partio komencis laborstilĝustigan movadon. D-ro Kotnis aktive partoprenis en ĝi kaj serioze studis verkojn de Prezidanto Maŭ pri la ĝustigado de laborstilo kaj koncernajn dokumentojn de nia partio kaj faris multajn notojn lige kun siaj pensoj. Li skribis: “Mi sentas ke tiu ĉi jaro estas unu el la ekstreme gravaj jaroj en mia tuta vivo.” “Tio signifas ke miaj vidpunktoj pri la mondo multe ŝanĝiĝis. Miaj malbonaj kutimoj — etburĝa ideologio — estas multgrade forigitaj. Tian ŝanĝiĝon konsciis ne sole mi, sed ankaŭ multaj aliaj kamaradoj.” Post provado en bataloj kaj lernado en la ĝustigado de laborstilo D-ro Kotnis havis iom post iom pli da kono pri la Komunista Partio de Ĉinio. Li vidis, ke tiu partio kiu prenis la marksisman-leninisman teorion kiel sian gvidilon kaj liberigon de la tuta homaro kiel sian batalcelon, kaj komplete rompis la mallarĝajn naciajn limojn, estas vera proleta partio, kiu reprezentas la popolajn interesojn kaj servas al la popolo. “Ĉu fremdulo povas aliĝi al la Komunista Partio de Ĉinio?” Tiu de-

mando ofte ondis en lia cerbo. Fine li oficiale prezentis sian deziron al la partiaj organizoj de la hospitalo kaj la instituto ke li volas aliĝi al la Komunista Partio de Ĉinio. Sub edukado de la Partio kaj helpado de kamaradoj, lia volo fine estis realigita kaj en julio de 1942 li glorie aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. En la tago de aliĝo al la Partio li solene ĵuris sub la partia standardo: “Mi decidis fordoni ĉion mian al la Komunista Partio de Ĉinio, kaj mian estontecon mi disponigos al la Komunista Partio de Ĉinio.” “Mi batalos por ĉiam kune kun la armeanoj kaj popoloj de la liberigitaj regionoj ĝis la finverŝo de mia sango.”



La Tuthindia Delegacio de la Memoriga Komitato de D-ro Kotnis en la Memorhalo de D-ro Kotnis

Kiel partiano, D-ro Kotnis ĉiam memoris sian ĵuron “Batali dum la tuta vivo por realigi la grandan idealon de la komunismo”. Por helpi la ĉinan revolucion li tute metis sian vivon ekster sia konsidero, estis senlime lojala al la revolucio kaj laboris por la ĉina popolo ĝis la lasta spiro. En 1942, malsano de tempo al tempo atakis lin, tamen li ĉiam rifuzis ripozi kaj streĉe laboradis tage kaj nokte. La partia organizo rimarkis ke pli kaj pli malboniĝis lia sano, kaj multfoje admonis lin forlasi provizore la postenon por kuraciĝi aliloke, li tamen firme rifuzis tion. Li diris: “Ĉiam pli malfacilaj fariĝas la batalaj cirkonstancoj, kaj ĉiam pli multaj estas vunditoj kaj malsanuloj. Ĉiam kiam mi viĝas soldatojn de la Okavoja Armeo, kiuj batalas brave kaj timas nek sangadon nek vivoferon, mi sentas ke mia malsano estas nenio kaj mi absolute ne devas forlasi mian batalan postenon.” Foje graviĝis lia malsano, sed kiam li informiĝis ke iu paciento bezonas tujan kuracadon, li tuj leviĝis de la terlito kaj volis iri al la paciento. Ĉiuj kamaradoj

ĉiamaniere admonis lin, li tamen diris: “Kuracisto, se li nur vivas, ne devas forgesi vunditojn kaj malsanulojn.”

La 8-an de decembro 1942, la tagon antaŭ lia morto, D-ro Kotnis, post tuttaga laborado, ankoraŭ antaŭaranĝis laŭorde la farotajn operaciojn kaj praktikan lecionon por la sekvonta tago. Nokte, graviĝis neatendite lia malsano, kaj ĉiurimeda kuracado ne donis efikon. Kaj bedaŭrinde D-ro Kotnis forpasis je la 6-a horo matene de la 9-a de decembro. Per siaj sango kaj vivo, D-ro Kotnis verkis imponan kanton de internacia komunismo por la amikeco inter la ĉina kaj hinda popoloj de senfinaj generacioj. Lia nomo ĉiam simbolas tiun amikecon.

Por memori tiun ĉi grandan internaciisman batalanton, heredi kaj disvolvi lian revolucionan spiriton, la

granda gvidanto kaj instruisto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ en sia funebra skribajo diris: “Nia hinda amiko D-ro Kotnis venis de fore al Ĉinio por helpi nin rezisti kontraŭ la japana agreso, laboris kvin longajn jarojn en Jan-an kaj Norda Ĉinio por kuraci vunditojn. Lia morto kaŭzita de trolaciga laborado rabis de nia armeo kapablan helpanton kaj nia nacio perdis karan amikon. Ni neniam devas forgesi lian internaciisman spiriton.” La armeanoj kaj popolanoj de la milita regiono de Ŝanhi-Ĉahar-Hebej kaj la amasoj de ĉiuj rondoj de Jan-an okazigis funebrajn kunvenojn. La granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj Ĉefkomandanto Ĝu De skribis siatempe kondolencan leteron al la Hinda Nacia Kongreso, kaj ankaŭ Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj Vicprezidanto Song Kingling kaj siatempe skribis kondolencajn leterojn al la familio de D-ro Kotnis.



Cangŝan-monto kaj Erhaj-lago

de HIA KJUANŜENG

CANGŜAN-monto kun siaj 19-
altaj krestoj staras apud la dolĉ-
akva Erhaj-lago en la Dali-a Baj-
nacieca Subprovinco sur la okciden-
ta Junnan-a Altebenaĵo de Ĉinio. La
monto kaj la lago en kombino for-
mas unikan pejzaĝon de la loko.
Nun ili prezentiĝas pli belaj dank'
al longdaŭra reformado kaj kons-
truado fare de diversnaciecaj labo-
ruloj.

LA IMPONA MONTO

Cangŝan-monto kun jadosimilaj ŝtonoj kaj verdaj arbaroj apartenas al Hengduan-montaro. Ĝi longas de la suda ĝis la norda fino je 42 km. kaj larĝas je 24 km. Ĝiaj 19 montpintoj staras unu apud alia en vico de nordokcidento al sudoriento. La ĉefa montpinto Malong altas je 4,122 metroj kaj la aliaj je 3,000-4,000 metroj. Varias la specoj de la vegetaĵoj en malsamaj altecoj sur la monto egale al tiuj sur samnivela ebena longa je 10,000 km. en direkto de latitudo. Tiu loko estas grava riĉfonto de vegetaĵoj en sudokcidenta Ĉinio. Ĉe la monttalo kreskas pinoj, abioj, juniperoj kaj kaŝtanoj, kaj ĉe la montpiedo produktiĝas valoraj kuracherboj.

En la jaro 1639, Hju Hiake, la granda geografo de Ming-dinastio, piediris 5,000 kilometrojn kaj venis al Cangŝan-monto. Tie li faris penan esploron pri la topografio, terformo, fontoj, kavernoj, ŝtonoj, floroj kaj aliaj naturaj objektoj, kaj

verkis vivecajn notojn, per kio li liveris al la posteuloj valorajn materialojn por studi la naturan geografion de Cangŝan.

Nun la montpintoj de Cangŝan ankoraŭ konservas la piramidan formon de antikvaj montoj eroditaj de glacirivero kaj restas sur ĝi lagoj de glacia amfiteatro, glaciaj bosoj kaj U-formaj valoj pro degelado de glacirivero, kiuj estas bonaj objektoj por studi la historion de la kvaternara glacia epoko de nia lando.

Ĉe ambaŭflankoj de la monto troviĝas multaj faŭltoj, kaj en profundaj ravinoj estas ŝtonpordoj kaj rokpointoj kreitaj de forta tranĉado de akvo-fluoj. Iuj ravinoj larĝas nur je 5 metroj sed profundas je pli ol 200 metroj. Tiaj strukturoj formis la 18 fame konatajn akvo-fluojn ornamitajn de neĝmontoj, kiuj fluas aŭ flugas inter la 19 montpintoj. En vintro nebulo tuttage kovras la monton, sed la ĉielo super Erhaj-lago estas serena. Ĉio ĉi tio formas kuriozan pejzaĝon.

LA ĈARMA LAGO

Oriente de Cangŝan-monto sin etendas la vasta Erhaj-lago kreita de faŭlto en la geologia historio. Ĝi estas la plej granda dolĉakva lago sur la altebenaĵo en sudokcidenta Ĉinio.

Kunmingĉi estas ĝia alia nomo. La lago ricevis sian nomon "Erhaj" pro tio, ke ĝia formo similas al

orelo. ("er" ĉine signifas orelo kaj "haj" — maron) Ĝia totala surfaca areo estas 260 kvadrataj kilometroj. La akvo de la lago fluas tra kelkaj riveroj en Lancang-riveron. La lagakvo kuras tre rapide tra krutaj kaj profundaj ravinoj kun akvonivela diferenco de 400 m. kaj entenas riĉan hidraulikan fonton.

La loko de Erhaj estis granda interna baseno farita de faŭlto en la lasta periodo de la glacirivera epoko kaj poste transformiĝis en lagon pro kuniĝo de akvo-fluoj. Laŭ onidiro, en la antikveco la akvonivelo de la lago estis pli alta kaj poste malaltiĝis iom post iom pro profundiĝado de valoj. Dank' al tio aperis bordetendaĵoj, marĉoj kaj basenoj ĉe la lago. La fundo de la okcidenta parto de la lago elakviĝis iom post iom pro altiĝo de la monto kaj ŝanĝiĝis en riĉan agrikulturan regionon kun milda deklivo. La fundo de la orienta parto malaltiĝis. Kaj pro tio la erodita bordo estas kruta kaj la lago profundas je 15 metroj, kaj la izola monteto turniĝis en tri belajn insuletojn kaj rifojn. La lago levas ondojn eĉ en milda vento kaj kiam ventegas, ĝi freneze muĝas kvazaŭ maro. Krom la surtera akvo la lago senĉese sin provizas ankaŭ per akvo el la faŭlto de la lago-fundo. Erhaj kun pli ol 3 miliardoj da kubmetroj da akvo estas la plej granda el la lagoj de sudokcidenta Ĉinio. La ventumilaj aluvioj apud

la lago kaj ĉe la montpiedoj formis fekundajn malgrandajn ebenaĵojn kun ŝtupaj kampoj. Oriente de la lago etendiĝas ondantaj rondaj montetoj, kaj longa eroziado farita de la lago kreis rompitaĵajn rokojn, bordajn kurbojn, insuletojn, lage-tojn kaj serpentajn riveretojn. Ĉirkaŭ la lago vice staras poploj kaj salikoj. La pitoreska pejzaĝo famiĝis tra la lando.

Erhaj-lago havas favorajn kondiĉojn por fiŝoj, salikokoj kaj konkoj, kaj ĉiujare liveras centmilojn da kilogramoj da akvoproduktaĵoj. La plej famaj produktaĵoj estas arkforma fiŝo (*schizopyge taliensis*) kaj drak-unga legomo, kiun tre ŝatas la baj-nacieca popolo. Por utiligi la terenon de la lago por fiŝbredo, la aŭtonoma subprovinco speciale fondis bredejon de bonrasaj fiŝoj por esplori la vivleĝon de fiŝoj en la lago, kaj alkonduki bonrasajn fiŝojn.

La ŝtupaj hidroelektrejoj de Erhaj kun kapacito de centmiloj da kilovatoj, konstruitaj en la kultura revolucio, jam komencis liveri elektron al fabrikoj, minejoj, vilaĝoj kaj montregionoj.

BELA MARMORO

La marmoro de Dali estas valora konstrua materialo produktita de Cangŝan. La marmora minejo ĉe la piedo de Sanjangfeng-monto de Dali jam havas historion de pli ol mil jaroj.

Marmoro formiĝis rezulte el geologia struktura ŝanĝiĝo. En la pra-tempo, ĉe Cangŝan-monto estis maro. En ĝi vivis ekinodermoj kiel mara lilio (*Pentacrinus as-terius*) kaj primitivaj fiŝoj, sur ĝia bordo kreskis altaj vegetaĵoj kiel pteridoj (*Pteridium aquilinum*) kaj en la fundo sedimentiĝis tavolo de restaĵo de kalkecaj korpoj dika je kelkmil metroj. Parto de la kalkŝtono tra geologia ŝanĝiĝado de centmilionoj da jaroj kristaliĝis en delikatan marmoron. Iuj minaj elementoj havigis al marmoro diverskolorajn belajn vejnojn similajn al desegnoj de foraj montoj, vastaj akvosurfacoj, altaj montoj unuj super aliaj, nigraj nuboj ktp. La plej bona speco de marmoro estas blanka kun nigraj vejnoj.

En la malnova socio, tiaj mirindaj ŝtonoj estis uzitaj nur de grandaj

sinjoroj, burokratoj kaj bienuloj kiel ornamaĵoj kaj dekoraciaĵoj. Kiu sciis, kiom da penoj kaj sango de la baj-nacieca popolo kristaliĝis en tiuj marmoraj objektoj! Tiam la elfosado de marmoro estis farita tute per manlaborado. Por priskribi tion iu verkis jenan version: "El sango de la fingroj de la metiistoj fariĝis belaj vejnoj de la marmorajoj."

Nun oni jam elfosas marmoron per dinamito kaj maŝinoj. La mallarĝa serpenta vojeto estas transformita en ŝoseon, sur kiu kuras kamionoj plene ŝarĝitaj per marmoraj pecoj. Lastatempe oni malfermis novan minejon de blanka marmoro. Ankaŭ en prilaborado oni aplikas maŝinojn. Antaŭe oni produktis nur marmorajn ornamaĵojn kaj belartaĵojn, sed nun la specoj de marmoraj produktaĵoj jam plimultiĝis ĝis dekoj, inkluzive de konstruaj materialoj kaj partoj de elektraj instrumentoj kaj industriaj aparatoj. En la ekspoziciejo de produktaĵoj estas montrataj diversaj lerte faritaj marmoraj objektoj. Tiuj produktaĵoj estas bone akceptataj ne nur de nia popolo sed ankaŭ de internaciaj amikoj.

Ĉe bordo de Erhaj-lago





Lana litkovrilo

La foto montras ruĝan lanan litkovrilon. En tiu ĉi ordinara litkovrilo koaguliĝis kunbatalanta amikeco de maljunaj proletaj revoluciistoj de Ĉinio kaj ilia fideleco al la revolucio.

En la 14-a de decembro, 1931, responde al la alvoko de la Komunista Partio de Ĉinio rezisti kontraŭ la japanaj agresantoj, Kamaradoj Ĝaŭ Boŝeng, Dong Ĝentang kaj aliaj kun pli ol dek mil soldatoj de la Dudeksesa-voja Armeo de Kuomintango insurekciis ĉe Ningdu de Gianghi-provinco kaj aliĝis al la Ruĝa Armeo. Poste, tiuj trupoj estis reorganizitaj en la Kvinan Korpuson de la Ruĝa Armeo. La heroo insurekcio ĉe Ningdu skuis la reakcian regadon de Kuomintango, konsternis la imperiistojn kaj skribis brilan paĝon en la ĉina revolucia historio. Dum festado de la Ningdu-a Insurekcio, Kamarado Dong Ĝentang donacis tiun lanan litkovrilon al Kamarado Ĝu De kiel memorajon. Kun ĝi Kamarado Ĝu De partoprenis en frakaso de "ĉirkaŭekstermoj" de la Ĉiang Kajŝek-a reakcia klico, en la mondfama Longa Marŝo de 25.000 Lioj kaj venis al la revolucia lulilo Jan-an. Post la insurekcio, Kamarado Dong Ĝentang estis fidela al la revolucia afero de la popolo, brave batalis, peneme luktadis en malfaciloj kaj heroe oferis sian


vivon en batalo en 1937. Prezidanto Maŭ montris, ke Kamaradoj Ĝaŭ Boŝeng, Dong Ĝentang k.a., kiuj gvidis la insurekcion ĉe Ningdu, fariĝis firmaj revoluciaj kamaradoj". Post la morto de Kamarado Dong Ĝentang, Kamarado Ĝu De rigardis la litkovrilon kiel ankoraŭ pli valoran memorajon.

Post la Hi-an-a Evento en decembro, 1936, Kamarado Ĝoŭ Enlaj veturis al Hi-an kiel plenrajtigita reprezentanto de la Komunista Partio de Ĉinio, por intertraktado kun Ĝang Hjueliang, Jang Huĉeng kaj la arestita Ĉiang Kajŝek, por devigi Ĉiang Kajŝek akcepti la proponon ĉesigi la enlandan militon kaj kune rezisti kontraŭ la japanaj agresantoj.

En frosta vintro de norda Ŝenhi, Kamarado Ĝoŭ Enlaj plurfoje veturis inter Jan-an kaj Hi-an kaj faris malfacilan batalon por fondi kaj firmigi la Kontraŭjapanan Nacian Unuecan Fronton. Kamarado Ĝu De donacis la litkovrilon al Kamarado Ĝoŭ Enlaj por esprimi al li sian estimon. En majo de 1937, Kamaradoj Ĝoŭ Enlaj, Ĝang Junĵi k.a. veturis al Nankino por plenumi gravan taskon de firmigo de la Kontraŭjapana Nacia Unueca Fronto. Survoje de Jan-an al Hi-an, ili estis atakataj de armitaj banditoj senditaj de la kuomintanga

reakciularo ĉe Laŭŝan en Gankjuangubernio. En danĝeriga situacio, Kamarado Ĝoŭ Enlaj persone direktis la kamaradojn brave batali. La batalo iris tre intense kaj kruele kaj kelkaj kamaradoj heroe oferis sian vivon por ŝirmi la aliajn. Tiuj banditoj intencis subfosi la kontraŭjapanan nacisavan aferon de la ĉina popolo per mortigo de Kamarado Ĝoŭ Enlaj, sed ilia intrigo ne sukcesis. Informiĝinte pri tio, kavalerianoj de norda Ŝenhi kaj infanteria trupo de la limregiono alrapidis, kaj la forte kolerigitaj banditoj furioze faris dekelkajn hakojn al la litkovrilo kaj panike forfuĝis. Sed post nelonge tiuj banditoj estis tute ekstermitaj de la armeo kaj popolo de nia limregiono. Kamarado Ĝoŭ Enlaj ĉiam memoris la kamaradojn viktimiĝintajn ĉe Laŭŝan.

Post la Incidento de la 7-a de Julio, aperis en la tuta Ĉinio alta tajdo de rezisto kontraŭ Japanio, sub la gvido kaj antaŭenpuŝado de la Komunista Partio de Ĉinio, Kamarado Ĝu De fariĝis ĉefkomandanto de la Okavoja Armeo kaj estis baldaŭ rapidonta al la fronto de la Kontraŭjapana Rezistmilito. Kamarado Ĝoŭ Enlaj redonacis la litkovrilon al la revolucia heroo Kamarado Ĝu De. En aprilo de 1938, Kamarado Ĝu De profunde penetris en la postfronton de la



La lana litkovrilo uzita de Ĉefministro Ĝoŭ

malamiko kaj sub lia direktado la brava Okavoja Armeo frakasis naŭkolonan ĉirkaŭatakon de la japanaj agresantoj en sudorienta

Sanhi. La popolamasoj de Tajhangmontaro tre amis siajn armeanojn kaj alte estimis Ĉefkomandanton Ĝu. Ili hejtis la terliton varma,

por ke la armeanoj bone ripozu. Lunokte, la lana likovrilo ekbruliĝis pro neatento pri la varmega terlito kaj ricevis truegon. Kvankam ĝi estas nur ordinara lana litkovrilo, tamen ĝi estas historia atestaĵo pri la malfacilega kaj danĝerplena batalado de maljunaj proletaj revoluciistoj sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, por la liberiga afero de la ĉina popolo. Kiel oni povas lasi ĝin resti difektita? Kamaradino Kang Keking, edzino de Kamarado Ĝu De, zorge ĝin flikis. Kun ĝi Kamarado Ĝu De travivis la okjaran Kontraŭjapanan Rezistmiliton kaj la trijaran Liberigan Militon. Post la liberigo de nia lando li fine donacis ĝin al la Milita Muzeo de la Ĉina Popola Revolucio.



NOVA SUKCESO DE MIKROONDA TELEKOMUNIKO

Lastatempe, la vastaj amasoj de PTT-laborantoj de Ĉinio sukcese elfaris aparaton M 2 de 960-kanala mikroonda telekomunika sistemo,

sur la bazo de la sukceso de la aparato M 1 de tia sistemo. Ĉiuj ĝiaj elementoj kaj partoj estas fabrikitaj de nia lando. Laŭ ekspertizado de la ŝtato, ĝiaj ĉefaj funkcioj kaj teknologiaj normoj konformas al la projektaj postuloj.

La aparato M 2 estas multe pli bonigita ol la aparato M 1, ĝiaj sistemo kaj funkcioj konformas al la karakterizajoj de la konstruado de trunka mikroonda komunika linio de nia lando kaj al la bezonoj por transsendi koloran televidan programeron. Ĝi ne bezonas deĵoranton en relaĵsa stacio, funkcias kompare stabile kaj ĝia teknologia nivelo estas relative alta.

Post pogranda produktado de ĝi, la trunkaj linioj de la ĉina mikroonda telekomuniko estos pli bone ekipitaj. Tio havas gravan signifon por konstrui mikroondan

telekomunikan reton kun alta kvalito kaj alta efikeco kaj servigi ĝin al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj efektivigi modernigon de la agrikulturo, industrio, nacidefendo, scienco kaj teknologio de nia lando.

35,000 KILOMETROJ DA NOVAJ ŜOSEOJ

En la jaro 1976, Ĉinio konstruis 35,000 kilometrojn da novaj ŝoseoj, dank' al kio pli ol 1,500 komunumoj estas ligitaj per la ŝoseoj. Kaj krome, oni asfaltis vojojn de 15,000 kilometroj kaj konstruis nombronda pontoj super la Flava Rivero, Mingiang, Vugiang, Janhe, Ginŝangiang kaj aliaj ĉefaj riveroj. La transportaj kvantoj de pasaĝeroj kaj varoj per aŭtoj pligrandiĝis respektive je 8% kaj 4% ol tiuj de la jaro 1975.

MEMORIGAJ POŝTMARKOJ

Por memori la 30-an datrevenon de la Insurekcio de la 28-a de Februaro de la popolo de Tajvan-provinco, la ĉina Ministerio de Poŝto kaj Telekomuniko eldonis kompletan da memorigaj poŝtmarkoj.

Ĝi konsistas el du pecoj. Unu montras scenon de la Insurekcio de la 28-a de Februaro fare de la popolo de Tajvan-provinco. Kuragiĝate de la batala alvoko de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ: "Al la nova alta tajdo de la ĉina revolucio", la popolo de Tajvan-provinco brave okazigis armitan insurekcion en la 28-a de februaro, 1947, kunagante kun la Liberiga Milito de la patrolanda ĉeftero kaj forte batis la reakcian regadon de Ĉiang Kajŝek-kliko. La alia prezentas en supra parto grandiozajn paradajn kolonojn kun giganta rubando kun surskribita slogano "Ni nepre liberigos Tajvan!" antaŭ Tian-anmen-pordego, maldekstre en malsupra parto la lagon Ĵijuetan, dekstre Tajvan-ajn samlandanojn kun kvinstela ruĝa flago en la manoj. Ĝi spegulas, ke la popolo de Tajvan direktas sian koron al la socialisma patrolando kaj decidis unuiĝi kun la popolo de la patrolanda ĉeftero kaj kune batali por liberigi Tajvan-provincon kaj unuigi la patrolandon.

CELEBRO DE LA TIBETAKALENDARA NOVJARO

Tibetaj liberigitaj servutuloj ĝoje celebris la unuan tibetakalendaran novjaron post la faligo de la "kvarpersona bando".

La 18-a de februaro de la kuran-ta jaro estis tibetakalendaro novjaro kaj ankaŭ la Printempa Festo de

la hanoj. Okaze de tio, la antikva urbo Lasao dronis en atmosfero de ĝoja festo. En frua mateno de tiu tago miloj kaj dekmiloj da liberigitaj servutuloj tajde torentis al la Kultura Palaco, la Stadiono, la Liuŝahe-a Hipodromo kaj aliaj lokoj. Diversaj literaturaj kaj artaj organizoj kaj pli ol 1,000 sportaj amatoroj prezentis tibetan operon, kantojn, dancojn, dramojn, ĉevalan vetkuron, arkopafadon, ŝnurotiradon, pafadon kaj aliajn programe-rojn por dekmiloj da laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

En bruo de tamtamoj, tamburoj kaj petardoj, liberigitaj servutuloj de Ĉengguan-kvartalo de la urbo Lasao prezentis "Prezidanto Hua Venis al Nia Hejmo" kaj aliajn programerojn en la formoj de tibeta opero, kanto kaj danco, kiujn ŝatas la tibeta popolo. Komunumanoj de la antaŭurbo invitis al sia hejmo malmobilizitajn soldatojn kaj studentojn devenintajn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kiuj venis de interna regiono al Tibeto por tie fiksloĝi. Ili interparolis pri la profunda amikeco kaj solidareco en batalo inter la tibetanoj kaj hanoj, kune trinkis buteran teon kaj sekalan vinon kaj indigne kritikis la neindulgeblajn krimojn de la "kvarpersona bando" en subfosado de la interrilato inter la naciecoj.

ĈINIO OKAZIGIS SURGLACIAN SPORTAN KUNVENON

En la komenco de la kuran-ta jaro, la Ĉina Surglacia Sporta Kunveno de 1977 havis lokon en Gilin-provinco.

Pli ol 600 diversnaciecaj surglaciaj sportistoj venintaj el la Ĉina Popola Liberiga Armeo, Pekino, Hingiang, Ninghia, la Interna Mongolio, Hebej, Hejlonggiang,

Gilin kaj aliaj 13 urboj rekte administrataj de provincoj kaj sub-provincoj respektive partoprenis en la glacihokea konkuro okazigita en la urbo Gilin kaj konkursoj de rapida sketado kaj arta sketado en la urbo Jangi.

Por ke sporto pli bone servu al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, triono de la maĉoj de glacihokea okazis en fabrikoj, lernejoj kaj aliaj bazaj unuoj. Utiligante ripozan tempon la sportistoj de rapida sketo kaj arta sketo venis al Jangi-gubernio, kie loĝas multaj koreanoj kaj la urbo Tumen ĉe landlimo por prezenti por laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj estis bonvenigitaj de ĉirkaŭ 40,000 spektatoroj.

Ankaŭ multaj geknabaj sportistoj partoprenis en la surglacia sporta kunveno. Ili partoprenis en la geknabaj konkursoj de glacihokea, rapida sketo kaj arta sketo, kaj akiris ĝojindajn sukcesojn.

DINOSAŬRAJ FOSILIOJ NOVE TROVITAJ

Ĉinaj sciencaj laborantoj unuafoje trovis valorajn dinosaŭrajn fosiliojn en Ĉamdo-regiono de Tibeto, alta je pli ol 4,200 metroj super la mara nivelo.

La trovajoj havas gravan signifon por esploro pri la kaŭzo de leviĝo de Kinghaj-Tibeta Altebenajo kaj geohistorio, studo pri evoluo de praaĵ bestoj kaj vegetaĵoj, geografiaj medioj, praa klimato, praa topografio ktp.


Post unuapaŝa ekspertizado oni konstatis, ke la ĉifoje trovitaj dinosaŭraj fosilioj apartenas al 11 specioj, el kiuj la ĉefaj estas fosilioj de lacertpieda dinosaŭro, kiu vivis en la frua kaj meza periodoj de juraso-epoko antaŭ 160,000,000 -- 140,000,000 jaroj.

Ekfunkcio de giganta etilenoprodukta instalaĵo

Instalaĵo kiu kapablas produkti ĉiujare 300.000 tunojn da etileno estas finkonstruita kaj bone funkcias en la Pekina Ĝenerala Petrolkemia Fabriko.


Etileno estas fundamenta materialo de la moderna petrolkemia industrio. La nomita instalaĵo estas unu el la ĉefaj konstruaj objektoj de nia lando kaj la plej granda konstruaĵo de petrolkemia industrio en Pekino post la Liberigo. Tiu grandskala kaj teknike komplika konstruaĵo inkluzivas ekipaĵojn por produkti ĉiujare 300,000 tunojn da etileno kaj necesajn ekipaĵojn por rafinado de petrolo. La konstruado komenciĝis en aŭgusto de 1973 kaj finiĝis en la komenco de majo de 1976. Ĝi ne nur liveros grandan kvanton da materialo por pliproduktado de plasto, sinteza kaŭĉuko kaj aliaj kemiaĵoj, sed ankaŭ akumulos sperton por rapidigi la disvolviĝon de la petrolkemia industrio de nia lando.

La aerlasa tubo alta je 121.5 metroj kaj peza je 225 tunoj estas instalata en tuto.



Juna laboristo kaj teknikistino de la sekcio de aerprema maŝino en manipulado







La etilenprodukta instalajo

Vigle disvolviĝas industrio de Ĉangvej de Ŝandong-provinco

Ĉangvej-subprovinco kun 13 gubernioj estis agrikultura regiono kun malforta industrio. En la pasintaj dek jaroj, sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ ĝi plene disvolvis aktivecon de la centra kaj loka aŭtoritatoj kaj prosperigis la lokan industrion servantan al agrikultura produktado per siaj propraj fortoj. La rapida disvolviĝo de industrio malfermis vastan perspektivon por agrikulturo.



En Ĉangvej fondiĝis malgranda ferŝtala kompanio inkluzivanta minekspluatadon, koaksofaradon, ferfundadon, afinacion kaj laminatadon. Jen la Vejfang-a Ŝtala Fabriko.






La laboristoj kaj kadroj faras provan manipulado en splita laborejo.

La Giaŭhian-a Fabriko de Forĝaj kaj Premaj Maŝinoj sukcese provfabrikis 2,500-tunan hidraŭlikan premaŝinon de helica spindelo. Jen laboristoj faras eksperimenton pri ŝarĝo.





Kadroj kaj laboristoj de la Vejfang-a Motoro Fabriko de Ŝandong diskutas pri teknika renovigo.

Produktajoj de la nove konstruita Ĉangvej-a Traktora Fabriko



Jen traktoroj produktitaj de Ĝučeng-gubernio.



Vitraj metiartaĵoj de Dalian

Dalian, marborda urbo sur duoninsulo de orienta Liaŭning de Ĉinio, produktas diversajn belajn kaj delikatajn vitrajn metiartaĵojn. Oni prenas silikon, kalciton kaj puran alkalon kiel ĝiajn ĉefajn materialojn kaj faras ilin tra libera formado aŭ gravurado. Nun la specoj de produktado nombriĝas pli ol 3,000, inter kiuj produktado de libera formado havas historion nur de pli ol dek jaroj en nia lando. Dank' al praktiko kaj saĝo de laboristoj niaj vitraj metiartaĵoj de libera formado jam havas sian apartan stilon.

Esplorado de novaj produktadoj





Pendaj lampoj



Pladoj



Florvazoj



Koral-fiŝoj



Zorgema farado



6614

